

# Kiel Lidia Zamenhof pereis en Treblinka

*Historiografia-beletra fantazio en 20 scenoj bazita sur realaj okazintaĵoj  
Teksto originale verkita en Esperanto surbaze de la memuara literaturo  
kaj publikigita okaze de la 70a datreveno de la liberigo de la NS-koncentrejoj en Eŭropo  
Memore pri Zofia Banet-Fornalowa, Jerzy Fornal, Josef Šemer kaj Robert Kuwalek<sup>1</sup>*

*Per bildoj ilustrita versio povas esti mendita por privata uzo ĉe [info@osteuropa.ch](mailto:info@osteuropa.ch).  
Mit Bildern illustrierte Version kann zum privaten Gebrauch bei [info@osteuropa.ch](mailto:info@osteuropa.ch) bestellt  
werden.*

La celoj de la rakonto estas sentigi ĉe la legantoj maksimumajn hororon, naŭzon kaj abomenon  
kaj eviti la ignoradon de la judeco kaj la prisilentadon de la holokaŭsto fare de la Esperanto-historiografio  
(Atenton: la teksto ne taŭgas por infanoj kaj homoj kun malfortaj nervoj)

## **Enkonduko: „Solvo de la juda demando“ kaj „Operaco Reinhard(t)“**

Kiel konate, la 30an de januaro 1939 en la germana Regna parlamento (nomata Reĥtago) kanceliero *Adolf Hitler* elpuŝis la minacon, ke „la juda raso en Eŭropo estos detruita, se la internacia financjudaro en kaj ekster Eŭropo sukcesos ankoraŭfoje ĵeti la popolojn en militon“. La nazioj komprenis tiun minacon kiel ordonon por persekuti kaj elimini la judojn de Eŭropo. Intertempe, tio jam okazis en Germanio, Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio. La milito kontraŭ Pollando komenciĝis la 1an de septembro 1939, kaj la 24an de junio 1941 la germana armeo atakis Sovetunion. En ĉiuj kazoj inter la unuaj celoj de la persekuto kaj detruo estis la judoj, kaj komunistoj. La 31an de julio 1941 *Hermann Göring* taskis la estron de RSHA, *Reinhard Heydrich*, ellabori „ĝeneralan projekton“ rilate al „kostoj, organizado kaj realigado de la fina solvo de la juda demando“. La definitiva decido neniigi la eŭropajn judojn estis farita verŝajne en aŭtuno 1941. La 12an de decembro de tiu ĉi jaro *Joseph Goebbels* notis en sia taglibro, ke la „Gvidanto“ decidis ekstermi la judojn, kio evidentiĝis dum kunsido de gvidaj funkciuloj de NSDAP en la privataj ejoj de la Regna kancelierejo. Dum la fifama konferenco en Wannsee ĉe Berlino, kiu sekrete okazis la 20an de januaro 1942 (kaj en kiu partoprenis ankaŭ *Adolf Eichmann*, kiu gvidis la protokolon), Heydrich baziĝis sur la menciita letero de Göring kaj klopodis ricevi la konsenton de la ĉefaj funkciuloj de ĉiuj gravaj ministerioj, kiuj estis alvokitaj konfirmi la planon de la „fina solvo de la juda demando“.<sup>2</sup> Oni interkonsentis, ke tiu „fina solvo“ estu efektivigita en la Ĝenerala Gubernio, do sur la teritorio de Pollando, kiu estis okupata de Germanio kaj regata de *Hans Frank*. Krom tio oni akceptis la planon, ke la judoj estu eliminataj kiel eble plej rapide, ĉar unue ekzistas la danĝero de epidemioj kaj due oni asertis, ke ĉe la judoj temas pri popolo, kiu en sia plimulto ne kapablas labori. Sekve al la konferenco en Wannsee okazis du pliaj postkunsidoj kun la alesto de pli malaltaj burokrataj ebenaĵoj por trakti detalojn. En tiuj kunsidoj partoprenis ankaŭ *Adolf Eichmann*, kiu respondecis pri transportado kaj evidente estis rekte envolvita en la realigo de la „fina solvo de la juda demando“ en la Ĝenerala Gubernio. Li reaperos en Treblinka.

Sekve, Regna gvidanto SS *Heinrich Himmler* taskis SS-brigadgvidanton *Odilo Globocnik*<sup>3</sup>, kiu estis SS- kaj policgvidanto de la lublina distrikto, efektivigi la t.n. „Operacon Reinhard(t)“,<sup>4</sup> kiu estis parto de la „programo Heinrich“ por „koloniigi la orienton“. Ĝi estis la kaŝnomo (laŭ Reinhard Heydrich<sup>5</sup>) por la industrieca mortigo de ĉirkaŭ 1,7-2 milionoj da judoj kaj 50'000 ciganoj el la Ĝenerala Gubernio (t.e. distriktoj Varsovio, Lublin, Radom, Krakovo kaj Galicio) en la koncentrejoj de *Bełżec*, *Sobibór* kaj *Treblinka*, parte ankaŭ *Majdanek* (bilancon pri pereintoj vd. en la fino). Krom la mortigo de la judoj mem, la operaco havis ankaŭ ekonomiajn celojn, nome la ekspluatadon de laborfortoj,

kalkuladon de posedaĵoj de judoj kaj rikoltadon de kaŝitaj valoroj kaj senmoveblaĵoj. Al la stabo de respondeculoj por la *operaco Reinhardt(t)* apartenis nazioj kiel *Hermann Höfle, Richard Thomalla, Christian Wirth, Franz Stangl, Ernst Schemmel, Imfried Eberl, Franz Reichleitner, Gottlieb Hering, Kurt Hubert Franz* (multaj el ili rikoltis sperton pri eŭtanazio<sup>6</sup> kadre de la „*Operaco T4*“<sup>7</sup>) kaj aliaj plus unu milo da ukrainaj kaj litovaj „libervoluloj“, kiuj estis trejnita por tiu speciala tasko en la koncentrejo de Trawniki.<sup>8</sup>

La deportado de unuaj judoj el la getoj de Lublino kaj Lembergo (Lvovo) al Belzec komenciĝis la 17an de marto 1942. En Sobibór la unua „prova“ gasumado de judoj okazis en aprilo 1942, kion sekvis industrieca amasmortigo de ĉirkaŭ 90'000 personoj dum majo ĝis julio. Por akceli la „Operacon Reinhardt(t)“ estis konstruita nova neniigejo en Treblinka, por pereigi verŝajne unu milionon da homoj, ĉefe judoj. La 19an de julio 1942 Himmler ordonis, ke ĝis la fino de decembro ĉiuj judoj de la Ĝenerala Gubernio devos esti likviditaj.

La ĉefaj respondeculoj por la „*Operaco Reinhardt(t)*“ kaj konstruado de la koncentrejo de Treblinka: Heinrich Himmler, Reinhard Heydrich, Odilo Globocnik, Richard Thomalla.

## I „Vojaĝo“ al Treblinka

Tristaj fervoj-vagonoj, kiuj ne estis por homoj sed por brutoj, alportis la deportitajn judojn al tiu terura loko, nomata Treblinka. Ili venis el ĉiuj direktoj, orienta kaj okcidenta, norda kaj suda. Tage kaj nokte en ĉiu horo (krom en la 'paŭzoj'). Printempe, somere, aŭtune, vintre. Treblinka povis digesti transportojn sen fino. Ju pli multaj, des pli bone. Ĉiutage al Treblinka veturis sesdeko da trajnoj kun po cent kvindek ĝis ducent homoj en ĉiu vagono, kio signifis en iuj tagoj kvin ĝis sep mil, en aliaj tagoj dek ĝis dek du mil aŭ pli. La polajn judojn oni transportis per brut-vagonoj, dum judoj el aliaj eŭropaj landoj alveturis en porpersonaj trajnoj. La homoj demandis: „Kien ni veturas?“ Neniu konis la veran respondon, sed ĉiuj kredis, ke oni veturigas ilin tien, kien iliaj fratoj kaj fratinoj veturadis jam de monatoj. Iuj 'vojaĝantoj' kredis, ke ili veturas al „oriento“, al Ukrainio, por labori sur la kampoj. Tion diris al ili iuj germanaj oficiroj. Kiam la judoj klopodis ekscii pli multe pri la celo de la vojaĝo, la kunveturantaj gardistoj, precipe latvaj, litovaj, ukrainaj kaj germanaj SS-anoj, rifuzis respondi kaj mistraktis la 'pasaĝerojn' plej krude. Ili volis ricevi la oron kaj monon de la sensciaj viktimoj, kiuj estis turmentataj per pafiloj kaj vipoj. Ĉiu deportito provis havigi al tiuj banditoj kelkajn zlotojn por eviti la batojn.

Survoje jam dum du-tri tagoj, la veturantoj terure sojfis. Iom da akvo kostis ĉe la gardistoj cent zlotojn aŭ unu horloĝon sen garantio ricevi ĝin. Kelkaj homoj trinkis sian propran urinon. La judoj – viroj kaj virinoj – estis kune, malvaste kunŝtopitaj en la vagonoj kaj enspirantaj la malbonan aeron. Ili pisis, kakis, kraĉis, vomis kaj sangis. Aŭdiĝis ĝemoj kaj muĝoj, krioj, lamentoj kaj ploroj. Okazis, ke de ekstere oni ial pafis kontraŭ la vagonojn. Tiel, homoj vundiĝis aŭ forpasis jam antaŭ ol alveni en Treblinka. En iuj stacidomoj la etuloj demandis, kiam oni alvenos en Treblinka. La respondoj de la apudrele vokantaj infanoj, ke oni „faros sapon el la judoj“, ŝokis la veturantojn kaj lasis ilin amare pensi pri tio, kio verŝajne atendas ilin aŭ donis al ili seriozan kaŭzon por timo.



Bildoj prunteprenitaj de <http://savannah1.eklablog.fr>



(Bildoj el Vikipedio) (Pligrandigo: <https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/2/27/Generalgouvernement.png>)

La trajno el Varsovio abrupte haltis en la stacidomo de Małkinia, kie la fervoja linio de Varsovio al Bjali-stoko kruciĝis kun la linio de Siedlce al Łomża. La vagonoj dume restis fermataj. En Małkinia la vagonaro estis 'vizitata' de iuj gardistoj, kiuj volis havi la valoraĵojn de la deportitoj, kaj polaj kamparanoj ofertis siajn varojn: akvon kontraŭ 100 zlotoj, panon kontraŭ 500 zlotoj. Poste la trajno pluveturis al la stacidomo de Treblinka, kiu situis jam aliflanke de la rivero Bug. La stacidomo de la vilaĝo Treblinka<sup>9</sup> konsistis el malgranda ŝtona budo, kiun la germanoj konstruis anstataŭ la malnova ligna konstruaĵo. Ambaŭflanke de la vagonaro staris SS-soldatoj kun maŝinaj pafiloj. En la stacidomo de Treblinka, kie la vagonaro haltis, ĝi estis transprenita de la personaro de la koncentrejo, dispartigita kaj sendita sur apudan relon, kaj kondukita, ĉiam per po dudek vagonoj en unu fojo, pere de pli malgranda lokomotivo, rekte en la koncentrejon.<sup>10</sup>

Por priskribi la hororan trajnveturon de Varsovio al Treblinka Abraham Kszepicki trovis jenajn frazojn: „Pli ol 100 homoj estis pakitaj en nian vagonon. Estas neeble priskribi la tragikan situacion en nia senaera, fermita varvagono. Ĉiu homo provis puŝi sin antaŭen al iu malgranda aertruo. Ĉiuj kuŝis sur la planko. Ankaŭ mi mem. Mi trovis fendon en la plafono, en kiun mi ŝovis mian nazon por ricevi iom da aero. La vagono estis unu sola granda tualetto. La odoro en la vagono estis neeltenebla. La homoj kakis en ĉiujn kvar anguloj de la vagono. De tempo al tempo la trajno haltis aprubte. Ŝaŭlisto (litova liber-volulo en la servo de la nazioj) eniris la vagonon – unue mi tute ne komprenis kial. Evidentiĝis, ke li simple venis por prirabadi nin. Ni devis alproksimiĝi al li kaj montri ĉiujn niajn posedaĵojn. La Ŝaŭlisto prenis ĉion, kio ne estis bone kaŝata: monon, horloĝojn, valoraĵojn. La situacio en la vagono malboniĝis. Akvon! Ni petegis la fervojajn laboristojn por ricevi akvon. Ni pretis kaj bonvolis pagi ilin bone. Kelkaj pagis 500 aŭ 1000 zlotojn por malgranda taso da akvo. La polaj fervojaj laboristoj kaj la Ŝaŭlistoj prenis la monon. Mi pagis 500 zlotojn (pli ol la duono de la mono, kiun mi havis) por duonlitro da akvo. Kiam mi komencis trinki, iu virino, kies infano svenis, atakis min. Mi trinkis. Mi ne povis forpreni la tason de miaj lipoj. (...) La situacio en la vagono fariĝis pli kaj pli terura. Estis nur la sepa matene, sed la suno jam hejtis la vagonon. La viroj forprenis sian ĉemizon kaj kuŝis duonnudaj. Ankaŭ la virinoj. La homoj anhelis kaj tremblis kiel februloj. Iliaj kapoj pendis, klopodante ricevi iom da aero en iliajn pulmojn. Kelkaj troviĝis en kompleta malespero kaj ne moviĝis pli longe. Ni atingis Treblinkan. Kelkaj troviĝis inertaj sur la planko de la var-vagono, aliaj probable jam mortis. Ni vojaĝis dum pli ol 20 horoj. Se la vojaĝo daŭrintus plian duontagon, la nombro de mortintoj estus multe pli granda. Ni ĉiuj estus pereintaj pro sufokiĝo. Poste mi eksciis, ke al Treblinka okazis transportoj, el kiuj estis forigitaj nur mortaj korpaj...”<sup>11</sup>

La teroro en la varsovia geto kaj la transportoj de la judoj el Varsovio estis organizataj de la fifamaj nazioj *Hermann Julius Höfle* kaj *Heinz Auerswald*,<sup>12</sup> du el plej gravaj praktikaj teknokratoj de la „fina solvo“.

Judoj antaŭ vagonoj en Varsovio, varvagono por ekspedi la judojn al koncentrejoj (el Vikipedio)  
Stacidomo de Treblinka (dekstra foto de la arkivo de Kurt Franz, komandisto de Treblinka, 1942-3)

Hermann Höfle kaj Heinz Auerswald, organizintoj de la holokaŭsto

## II *Treblinka I kaj Treblinka II*

Antaŭ ol starigi la neniigejon Treblinka ekzistis alia koncentrejo, kiu estis nomata ‚Treblinka I‘. Ĉi tiu punlaborejo estis instalita fine de 1941 de la aŭtoritatoj de Sokołów kaj de la SS kaj polico en Varsovio por enprizonigi „obstinajn elementojn“ de la regiono, kamparanojn, kiuj rifuzis liveri laŭkvotan agrikulturan produktadon, kiu estis postulata de la germanoj, kaj homojn, kiuj estis kaptitaj pro kontraŭgermanaj agadoj. Ĉefe poloj kaj judoj (meze 1000-1200) laboris en ŝtonrompejoj kaj sablofosejoj.<sup>13</sup> La koncentrejo ‚Treblinka I‘ estis gvidata de SS-ĉefsturmĝvidanto Theodor van Eupen,<sup>14</sup> kaj la personalo konsistis el dudeko da SS-uloj kaj unu taĉmento de sovetiaj, ĉefe ukrainaj Trawnikianoj. Aligita al tiu koncentrejo estis grupo de prizonuloj, kiuj laboris ĉe la stacidomo de Małkinia, kaj grupo de virinoj, kiuj estis devigataj labori en apuda bieno. Atestantoj, kiuj trovigis en tiu koncentrejo kaj postvivis vin, raportis pri la teruraj kondiĉoj en tiu loko, en kiu regadis brutalaj sadistoj, kiuj ne hezitis mortpafi homojn, se ili ne plaĉis al ili. La nomoj de tiuj SS-uloj estas konataj. Postmilitaj esploroj surbaze de kvardeko da amastomboj, kiuj enhavis la restaĵojn de ĉirkaŭ 6500 homoj, aperigis la rezulton, ke tra ‚Treblinka I‘ pasis ĉirkaŭ dek mil personoj.<sup>15</sup> Alia vero estas, ke la laboristaro de ‚Treblinka I‘ estis antaŭvidata por konstrui la koncentrejon ‚Treblinka II‘, pri kiu temos poste.

La koncentrejo ‚Treblinka II‘ estis konstruata laŭ ordono de Regna gvidanto SS Heinrich Himmler, kiun li faris la 17an de aprilo 1942, kadre la *operaco Reinhard(t)*, kun la ‚helpo‘ de anoj de la Varsovia geto, de prizonuloj de ‚Treblinka I‘ kaj de (judaj) „laboristoj“ de najbaraj vilaĝoj kaj urbetoj (precipe Węgrów kaj Stoczek). Kiel konstruistoj estis engaĝitaj la germanaj firmaoj Schönbronn kaj Schmidt & Münstermann. Pri la konstruado respondecis speciala SS-sekcio kaj la polico de la Varsovia distrikto. La konstruado de ‚Treblinka II‘ estis kontrolata de SS-Obersturmĝvidanto<sup>16</sup> *Richard Thomalla*<sup>17</sup> de Waffen-SS en Zamość, kiu estis submetita al SS-brigadĝvidanto *Odilo Globocnik* en Lublino, kiu jam konstruis la neniigejojn en Bełżec kaj Sobibór en la oriento kaj sudoriento de la „Ĝenerala Gubernio“<sup>18</sup> tuj apud la limo kun Ukrainio. En komparo kun „labor“-koncentrejoj kiel Aŭŝvico, Buĥenvaldo, Saĥsenhaŭsen, Daĥaŭ, la nomitaj lokoj estis puraj *mortfabrikoj*. Sed Treblinka devis esti ankoraŭ pli perfekte kaj efike konstruita por kompletigi la nesufiĉan kapaciton de la ekstermaj centroj en Bełżec kaj Sobibór. La 11an de julio 1942 oni proklamis la konstruadon de ‚Treblinka II‘ finita. Ĉiuj konstru-laboristoj estis mortigitaj,<sup>19</sup> do sennombraj („labor“-)judoj mortis jam dum la konstruado de la koncen-trejo ‚Treblinka II‘, antaŭ ol la industria amasmurdo de grandparto de la deportitaj judoj el la „Ĝenerala Gubernio“ kaj aliaj lokoj komenciĝis en la gasĉambroj de Treblinka.

La koncentrejoj de Treblinka situis sude de la rivero Bug, proksimume tri-kvar kilometrojn for de la vilaĝo kaj stacidomo Treblinka mem, en la komunumo Kosów. Fakte pli proksima al la koncentrejo ‚Treblinka II‘ situis la vilaĝo Wólka Okraĝlik. Treblinka troviĝas en sabla stepeca pejzaĝo, kies solaj ornamaĵoj estas pinarboj, juniperoj kaj erikacoj, kiuj estas ĉirkaŭataj de densaj konifer- kaj foliarbaroj.

La koncentrejo, fakte ekstermejo ‚Treblinka II‘ havis rektangulan teritorion de 600 x 400 metroj, ampleksante dudekon da hektaroj da surfaco, kaj estis limigita per du vicoj de 2,5 ĝis tri aŭ kvar metrojn alta barilo el pikildrato, kiu estis kovrata per sekaj branĉoj de kverkoj por esti nerimarkata kaj por bone ŝirmi la koncentrejon kontraŭ eventualaj rigardoj de ekstere. Speciala taĉmento (la t.n. „protektata brigado“) de „laborjudoj“ devis okupiĝi pri la aktuala stato de tiu barilo. La barilo estis ligita kun kvar ĝis ses ok metrojn altaj kontrolturoj, kiuj estis daŭre gardataj.<sup>20</sup> La kvina kontrolturo, kiu estis konstruita inter la du turoj en la suda perimetro, estis poste translokita en la centron de la koncentrejo, pli proksime al la konstruaĵo kun la gasĉambroj. En 1943, post Stalingrado, la koncentrejo estis sekurigita per duobla ekstera barilo kun ‚hispanaj ĉevaloj‘ kaj kontraŭ-tankaj obstakloj. Do, la kaŝado estis perfekta, kaj fuĝi



preskaŭ ne eblis. Entute la loko, kiun Himmler persone elektis, estis ideala por ekstermi centmilojn da homoj senrimarke.

Se oni ne konsideras la konstruiston **Richard Thomalla**, kiu funkciis kiel komdandisto de ‚Treblinka II’ en majo ĝis junio 1942, la unua ĉefkomandisto estis la aŭstra psikiatro (!) kaj fizikisto d-ro med. **Irmfried Eberl**,<sup>21</sup> kiu deĵoris en tiu mortfabriko de majo ĝis septembro 1942 en la rango de SS-Untersturmgvidanto. Lin sekvis SS-Obersturmgvidanto **Christian Wirth** kaj SS-ĉefsturmgvidanto **Franz Stangl**, kiu gvidis la neniigejon de septembro 1942 ĝis aŭgusto 1943 kiel ĝia komandisto. Plej lasta komandisto de Treblinka estis lia ĝisnuna anstataŭanto SS-Oberschergvidanto **Kurt Hubert Franz**, kiu komandis la neniigejon de Treblinko ĝis ĝia fino en novembro 1943. Wirth funkciis kiel inspektoro de la neniigejoj de Bełżec, Sobibór kaj Treblinka kaj en la hierarkio estis la ĉefo de la komandistoj de tiuj tri koncentrejoj. Pri tiuj komandistoj de la neniigo de la juda popolo detale temas ĉi-poste.

La komandistoj de ‚Treblinka II’: Irmfried Eberl, Christian Wirth, Franz Stangl, Kurt Franz. (El Vikipedio)

### III *Alveno en la fina haltejo*

La unua transporto de likvidotaj judoj atingis Treblinkan en la 23a de julio 1942.<sup>22</sup> La lokomotivo, stirata de germanoj,<sup>23</sup> grincante tiris (aŭ puŝis) la vagonojn malrapide tra la pordego de la koncentrejo, kiu malfermiĝis, dum la bufroj laŭte batis unu kontraŭ la aliaj, ĝis la *ramplo*,<sup>24</sup> kiu estis ĉirkaŭ 200 metrojn longa; la longeco de la reloy mem estis 300 metrojn, kaj ĉe ilia fino troviĝis alia ligna pordego, kiu restis fermita. Dum la enveturo tra la arbareto oni jam povis vidi lignajn barakojn kaj diversajn ‚strangajn’ homojn, tiel ke la alvenantoj komencis konfuzite demandi sin kaj unu la aliajn kie diable oni troviĝas kaj kio okazos. Tra la lukoj de la vagonoj la deportitoj ekvidis terurajn aferojn, kiuj totale ŝokis kaj perturbis ilin: Montojn de vestaĵoj, soldatojn kun botoj kaj maŝinaj pistoloj, virojn kun nigraj uniformoj montrantaj la ‚kapon de la morto’ kiel insignon kaj help-laboristojn kun diverskoloraj bendoj ĉirkaŭ la brako kaj kun balailo en la manoj. Kaj oni vidis ankaŭ amason da kadavroj, kiuj kuŝis dise tra la ejo. Jankiel Wiernik<sup>25</sup> memoris: ‚La placo de la koncentrejo estis plena de kadavroj, kiuj parte jam putris kaj odoraĉis; kelkaj ankoraŭ portis siajn vestaĵojn, aliaj estis nudaj. Iliaj vizaĝoj estis torditaj, nigraj kaj ŝvelitaj pro timo kaj hororo, la okuloj estis vaste malfermataj, la langoj pendis el la buŝo, la kranioj estis frakasitaj, la korpoj kripligitaj. Kaj ĉie estis sango’. Tio kaj paniko ekkaptis la alvenintojn. Tio ne estis koŝmaro sed la realeco. Iuj certe tuj komprenis: Tio estas koncentrejo!

Fakte, la koncentrejo unuavide ŝajnis esti normala loko: Laŭ ideoj de komandisto Franz Stangl ĝi havis propran ‚stacidomon’, kies nomo estis ‚*Obermajdan*’, kiun oni povis legi enire al la koncentrejo. Laŭ nova koncepto realigita en decembro 1942, la stacidomo ricevis ankaŭ sian ‚normalan’ infrastrukturon: La ‚stacidomo’ havis ‚giĉeton’, kie eblis ‚aĉeti biletojn’ por la ‚unua, dua kaj tria klasoj’. Stacidoma ‚oficisto’ kontrolis la kartojn de la ‚pasaĝeroj’, kiuj aĉetis bileton ĝis ‚*Obermajdan*’.<sup>26</sup> La stacidomo havis ankaŭ ‚stacidomestron’, ‚horaron’, horloĝon kun diametro de 70 centimetroj, kiu ĉiam indikis la saman sesan horon, ĝi havis ‚atendejon’, ‚informejon’ kaj ‚telegrafejon’. Voj-indikiloj montris la direktojn por ‚daŭrigaj trajnoj’, kiuj devus pluveturi – al Bjalistoko, Volkovisko kaj Baranoviĉi. Sed la stacidomo ‚*Obermajdan*’ oficiale ne ekzistis sed estis perfekta atrapo,<sup>27</sup> unika falsaĵo, giganta cinika trompo. Fakte, la ramplo signifis la finan haltejon por ĉiuj judaj alveturintoj, kaj de tie la trajnoj nenien plu veturis. Ili veturis nur reen, al Varsovio, por preni novan kvanton de judoj por veturigi ilin en la mortfabrikon de Treblinka. Kutime, la trajnoj alvenis ĝis la sesa horo vespere. Se ili alvenis poste, la viktimoj ne estis tuj mortigitaj en la sama tago kaj devis atendi. En tiu kazo la trajno kun la novaj viktimoj restis parkita en la stacidomo de Treblinka kaj veturis en la koncentrejon nur en la venonta tago.

### IV *La granda mensogo*

Iuj laŭtaj furiozuloj kun nigraj uniformoj krude malfermegis la pordojn de la vagonoj kaj dise kriegis diversajn vortpecojn en la rusa aŭ ukraina lingvoj – ‚*davaj, davaj!*’ Estis sovetiaj, ukrainaj gardistoj, kiuj staris per pafopretaj fusiloj sur la tegmentoj de la barakoj. Kaj SS-uniformuloj ordonis germanlingve: ‚*Raus! Raus! Los! Schneller! Pli rapide!*’ La viktimoj ricevis la ordonon kunporti sian manhavaĵon, sed la pli pezajn pakaĵojn ili devis forlasi jam ĉe la ramplo. Oni promesis, ke la varoj estos

„plusenditaj“ al la posedantoj. Sur iu tabulo la alvenintoj povis legi en la pola kaj germana lingvoj: „*Atenton, varsoviaj judoj! Vi troviĝas ĉi tie en tranzita lagro, de kie vi estos plu transportitaj al aliaj laborlagroj.*“ De la ramplo la alvenintoj estis perforte pelataj tra alia pordego, super kiu videblis la SS-emblemo kaj ĉe kiu staris armata ukraino, kiu kondukis la homojn al la *akceptejo*, kie ili estis ‘akceptitaj’ de brigado de tiel nomataj „*laborjudoj*”,<sup>28</sup> kiuj portis blujajn brakbendojn kaj devis ‘helpi’ al la viktimoj plenumi la ordonojn de la germanoj. Plue legeblis: *Por eviti malsanojn kaj epidemiojn* (en la koncentrejo furoris la ekzantema tifo kaj skabio kaj multaj prizonuloj havis altgradan febron) *oni devas doni siajn vestaĵojn kaj pakaĵojn por la seninfektado. Mono, oro, devizoj kaj juveloj estas transdonendaj al la kaso kontraŭ kvitanco. Ili estos redonitaj poste kontraŭ prezentado de la kvitanco. Antaŭ la pluveturo la alvenintoj devos bani sin por purigi sian korpon!*“ Ĉe la akcepto tuj okazis selektado de la viktimoj: „*Viroj dekstren, virinoj maldekstren!*“ La selektitaj homoj ne plu havis la okazon adiaŭi unu la aliajn kaj estis disŝiritaj por ĉiam. Patrinoj forte tenis kaj ĉirkaŭpremis siajn infanojn, kiuj ploregis. Kortuŝaj scenoj emociigis la homojn. Manfrapado, interkizado, bondezirado, larmoj. En tiu momento la homoj sentis, ke ili vidas sin por la plej lasta fojo; filoj kaj filinoj disiĝis de siaj gepatroj, nepoj kaj nepinoj de la geavoj, nevoj kaj nevinoj de la geonkloj, edzoj kaj edzinoj de siaj vivpartneroj.

Aliaj vojindikiloj, sur kiuj estis skribite „Al la lavejoj“, „al la parkgaraĝo“, „al la geto“, montris la direktojn al la diversaj areoj interne de la koncentrejo.

## V *La ordiga placo*

Kiel dirite, ĉe la alveno la homoj estis devigataj deponi la kunportitajn valoraĵojn kaj la monon, pri kio la germanoj tiom avidis, sed ankaŭ la vestaĵojn kaj ŝuojn. Por kolekti kaj ordigi tiun materialon ekzistis speciala *ordiga placo*, germanlingve nomata „Sortierungsplatz“, kiu situis dekstre de la stacidoma placo, aŭ sude de la akcepta placo. Preskaŭ ĉiuj alvenintoj ‘libervole’ transdonis ĉion, kion ili posedis, ĉar kiu ne tuj obeis la ordonon de la furiozaj gardistoj, tiu estis kruele batita aŭ riskis esti senkompate mortpafita. Iuj viroj devis starigi sin en unu vicon por esti selektitaj kiel helplaboristoj (inter ili troviĝis kelkaj postvivantoj, kiuj eltenis ĝis la fino kaj sukcesis fuĝi el la koncentrejo kaj rakonti al la homaro kio okazis en Treblinka). Ili estis pelitaj tien kaj reen kaj devis ordigi sur la *ordiga placo*, la vestaĵojn – mantelojn, jakojn, pantalonojn – , sakojn kaj ŝuojn, kiuj estis deponitaj de la alvenintoj kaj kiuj rapide amasiĝis sur la placo, kie staris barako, en kiu tiuj vestaĵoj estis stokitaj. Tiuj montoj estis multajn metrojn altaj. La ordigistoj, kiuj portis flavajn brakbendojn, stokis plej diversajn varojn – vestaĵojn, valizojn, dorsosakojn, protezojn, bastonojn, ĉapojn. La valizoj de la judoj enhavis tranĉilojn, tondilojn, kulerojn, okulvitrojn, razilojn. Precipe la judoj el foraj landoj alportis amason da pakaĵoj kun manĝaĵoj kaj valoraj varoj: sukeron, farunon, grion, panon, buteron, anseran ŝmalcon, nigran teon, kafon, dolĉaĵojn. Sur aliaj placoj estis kolektataj kotono, silko, lano, ĉifonoj, fadenrulaĵoj, infanaj pantalonoj, kudrokestoj, ktp. ktp. La infanĉaretoj estis uzataj por kolekti botelojn, konservojn kaj manĝilarojn el aluminio. Speciala atento estis donata al la kolektado de bankbiletoj, moneroj, oro, kolĉenoj, juveloj, braceletoj, ringoj, valorŝtonoj. La judoj kunportis siajn plej ŝatatajn valorpecojn al Treblinka, kiujn ili konservis dum generacioj. Kolekti tiujn valoraĵojn estis la tasko de la tiel nomataj „*oraj judoj*“. La valorobjektoj, kiuj estis pedante esplorataj de specialaj juvelistoj por taksu la valoron de la metalpecoj, estis kolektataj kaj pretigitaj por sendi al la Regna financministerio en Germanio, kie en kunlaboro kun la Regna banko, kiu servis kiel monlavejo, la oro estis fandita kaj plusendita en formo de orbrikoj al Svislando, kie lokaj bankoj kaŝe konservis la (parte anoniman) trezoron. Ĉi tiuj rabbitaj valoraĵoj servis por financi la krimojn de la Tria Regno. La alportitaj valoraĵoj faris el Treblinka unikan trezorejon, en kiu ĉiuj – kaj germanoj, kaj ukrainoj, kaj laborjudoj – profitis per komerca „spekulado“, kiel oni nomis la vendadon kaj aĉetadon de valoraj varoj. Pro tio, kiel Richard Glazar (Goldschmidt),<sup>29</sup> unu el ĉefaj postvivantoj de Treblinka, notis, ĉiuj estis interesataj pri la ekzisto de Treblinka, ĉar ĝi liveris valorajn kromproduktojn: monon, oron, diamantojn, juvelojn, metalon, ŝtofojn, ledon, hararon, nutraĵojn. La tuta regiono profitis de tiu sekreta marĉandado, do ankaŭ poloj. Ekzistis eĉ apartaj organizaĵoj aŭ firmaoj, kiuj veturigis kamionojn inter la koncentrejo kaj la vilaĝoj ĉirkaŭ Treblinka, kiuj havis la taskon aĉeti kaj vendi la varojn.

## VI *La lazareto*

En angulo ĉe la sudorienta flanko de la ordiga placo troviĝis speciala areo kun larĝa foso, en kiun oni ĵetis kaj kie oni bruligis la kadavrojn de viktimoj, kiuj forpasis en la trajno dum la transporto al Treblinka. Maljunulojn, malsanulojn, handikapitajn, vunditajn kaj sengepatrajn infanojn, kiuj ne havis sufiĉan kapablon aŭ forton por esti pelataj ĝis la gasĉambroj, oni jam selektis tuj post la alveno sur la

akcepta placo kaj likvidis en tiu areo. La tiel nomatan *lazareton* oni trompe kaŝis kiel hospitalon de la Ruĝa Kruco, kies flago estis hisita super la konstruaĵo. En la realeco tiu lazareto estis ekzekutejo, en kiu la germanoj likvidis plej diversajn persongrupojn: krom la supre nomitaj ankaŭ 'kapricajn' kaj malsanajn prizonulojn kaj mortpunendajn laborjudojn. Selektita persono devis sidiĝi sur benko, estis mortpafita de iu SS-ulo aŭ ukraina gardisto per pafo kontraŭ la nukon kaj falis en la tiean foson, kiu estis 12 metrojn longa kaj 4 metrojn profunda. En tiu foso oni bruligis ankaŭ dokumentojn, fotojn, diplomojn kaj kult-objektojn por forviŝi la spurojn.

Wolf Sznajdman atestis pri la lazareto jenan observon: „Mi iam havis la okazon vidi la „lazareton“. Estis malgranda barako, kie 'deĵoris' Kapo Kurland.<sup>30</sup> Li estis ordinara homo. Li portis brakbendon kun la simbolo de la Ruĝa Kruco sur ĝi. Kurland kutimis diri al la viktimoj: 'Senvestigu vin, kuracistoj esploras vin.' Poste, kiam ili sidis sur la rando de la foso, ukrainoj alproksimiĝis kaj mortpafis ilin.“

## VII Zonoj en la lagro

La koncentrejo 'Treblinka II' konsistis el tri integraj zonoj, kiuj estis pli-malpli same grandaj: la *loĝzono* (por la „personalo“<sup>31</sup> de la koncentrejo), la *akcepta zono* kaj la *eksterma zono*. La loĝa kaj akcepta zonoj kune formis la *malsupran lagron* (lagron I), kiu estis la areo, en kiu la viktimoj alvenis kaj kie ili estis „ekpreparataj“ de la „personalo“ por la neniiga procezo, t.e. por esti kondukitaj al la gasĉambroj, kiuj estis la esenca kaj fina celo de ilia vojaĝo. La loĝzono, kiu situis nordokcidente, estis 100 x 100 metrojn vasta, ĉirkaŭis la restadejojn, administrejojn, laborejojn, metiejojn, riparejojn, garaĝon, bakejon, butikojn, necesejojn kaj dormejojn de la „personaro“ de la koncentrejo, kiu havis sian oficialan enirejon tra la „Seidel-strato“, kiu etendiĝis ĝis la „stacidoma placo“. La komandisto loĝis en dometo tuj apud la enirejo, kaj la SS-uloj restadis en du konstruaĵoj proksime de la reloj. En la loĝzono funkciis tajloroj, ŝuistoj, lignaĵistoj, forĝistoj kaj masonistoj, kiuj devis plenumi la „civilajn“ dezirojn de la germana personaro. La kazerno, en kiu loĝis la ukrainaj gardistoj, portis la nomon de Max-Biala, laŭ iu SS-oficiro, kiu estis mortigita de judo en la koncentrejo.<sup>32</sup> En aparta dometo loĝis polaj kaj ukrainaj knabinoj, kaj en la lavejo kaj kuirejo laboris kelkdek judaj virinoj. Dum la „oraj judoj“ vivis en propra dometo en pli favora situo, la areo de la barakaro por la „laborjudoj“ nomiĝis „geto“. Apude troviĝis la latrino kaj la *apelplaco*. La koncentrejo 'Treblinka II' eĉ havis sian propran bestĝardenon, kie vivis kapreoloj, vulpoj, kolomboj kaj pavoj. En la koncentrejo troviĝis du putoj: la unua troviĝis apud la enirejo al la senvestiga areo, la dua en la t.n. Max Biala-kazerno. Ĉar la gvidantoj de la koncentrejo riskis enui dum dimanĉo, oni organizis teatrajn spektaklojn, koncertojn, dancojn. La publikon de tiuj 'kulturaj' aranĝoj konsistigis precipe germanoj kaj ukrainoj. La orkestro konsistis el judaj muzikistoj, kiuj devis ludi ĉiutage post la apelo kaj post la punbatadoj. Virinoj estis devigataj kanti en ĥoro kaj la judaj prizonuloj devis kanti judajn kanzonojn. Hermetike izolita de la alia parto de la koncentrejo etendiĝis en la sudorienta parto sur 200 x 250 metroj la *supra lagro*, nomata ankaŭ *mortlagro* aŭ lagro II. Ĝian alirejon kovris speciala protekta ŝirmilo. La supra lagro estis la loko, kie la judoj estis mortigitaj en la gasĉambroj kaj enterigitaj en la amastomboj kaj poste bruligitaj sur ŝtiparoj. La laboristoj de la supra lagro loĝis en aparta barako, kiu troviĝis malantaŭ la gasĉambroj ĉe la suda rando de la koncentreja limo proksime de la kvina kontrolturo, kaj ne havis kontakton kun la malsupra lagro. Grandparto de la orienta flanko de la koncentrejo konsistis el arboj. La kurenton de la koncentrejo produktis generatoro, kiu servis kiel elektrocentralo kaj staris apud la gasmaŝino.

## VIII Senvestigejoj kaj frizejo

„*Viroj restu, virinoj iru en la senvestigejon!*“ la alvenintoj aŭdis ĉe la akcepta aŭ ordiga placo, kie oni ordonis al la judoj senvestiĝi por preni la „seninfektigan banon“. Komence, la viroj devis fari tion rekte sur la placo mem, poste en la unua barako, kaj la virinoj kun ties infanoj estis senditaj al alia barako, kie ili devis ankaŭ lasi siajn ornamaĵojn. La ŝuoj devis esti demetitaj kaj kunbinditaj. La homoj, 'helpataj' de la „personalo“ kun ruĝaj brakbendoj, senprokraste obeis por eviti batojn kaj aliajn turmentojn. Ĉar kiuj malrapide senvestiĝis, al tiuj oni 'helpis' per kruelaj batoj; kiuj rifuzis senvestiĝi, al tiuj oni forŝiris la vestaĵojn perforte. Post la senvestiĝo la virinoj estis kondukitaj al apuda barako, kie troviĝis la „frizistoj“ (kun blankaj kiteloj) por tondi ilian hararon. Laŭdire, la virina hararo estis utiligata de la nazioj (Oficejo por Mararmeo) por garnaĵoj de motoroj kaj por matracoj de subakvaj ŝipoj. Ĉio kolektata en Treblinka estis resendata al Germanio; sur la trajnvagonoj oni povis legi la nomojn de la celurboj Bremen, Aachen, Schweinfurt ...

Post tio la virinoj aŭdis iun voĉon krei la ordonon: „*Achtung! Kunportu valoraĵojn, dokumentojn, monon, mantukon kaj sapon por la banejo!*“ Kvankam la virinoj liberiĝis de sia hararo, post la tondado multaj virinoj laŭdire eĉ sentis sin pli bone kaj kun iom da agrablaj emocioj pluiris kun la bantuko kaj la peco da sapo en la manoj, kiun ili prenis el siaj valizoj, en la direkto de la gasĉambroj sen imagi kio atendos ilin je la fino. Vintre, la virinoj kaj infanoj devis atendi nudaj en la frosto sub la batado de la gardistoj ĝis ilia vico venis por iri en la gasĉambron. Unu el la gardistoj, nomata Sepp, estis aparte sadisma tipo: li ŝatis puŝi virinojn kaj turmenti infanojn. Lia specialaĵo estis kapti infanojn ĉe la piedoj kaj dispecigi ilin aŭ ĵeti ilin kontraŭ la muron kaj forĵeti la korpojn.

Ĉie kaj ĉiam la homoj estis seninterrompe batataj per ledaj vipoj, bastonoj kaj fusilkolboj. Ĉie kaj ĉiam oni aŭdis ordonojn kaj vokojn *Achtung! Achtung!* unuflanke, kriojn kaj plorojn aliflanke. Ankaŭ pafoj estis aŭdeblaj. Malproksime sonis la muĝado de dizelaj motoroj. Ankaŭ fumo estis flarebla kaj videbla el iuj anguloj de la koncentrejo.

Pli detala mapo estis publikigita en Arad, Yitzhak: *Belzec, Sobibor, Treblinka. The Operation Reinhard Death Camps.* Blooming-ton and Indianapolis 1987. P. 39. Komparu kun la modelo sub [https://pl.wikipedia.org/wiki/Treblinka\\_\(KL\)#/media/File:PikiWiki\\_Israel\\_31806\\_Model\\_of\\_Treblinka\\_Death\\_Camp.JPG](https://pl.wikipedia.org/wiki/Treblinka_(KL)#/media/File:PikiWiki_Israel_31806_Model_of_Treblinka_Death_Camp.JPG)

## IX *La „tubo“ kaj la „kaso“*

Al la gasĉambroj kondukis speciala strato, kiu komenciĝis proksime de la barako de la virinaj frizistoj kaj formis 125 metrojn longan kaj 4-5 metrojn larĝan kanalon ambaŭflanke limigitan de du metrojn altaj bariloj kun ŝtaldrato ĉirkaŭvolvita per plantaĵoj, kie staris germanoj kun hundoj. Se tion la gardistoj deziris aŭ ordonis, la hundoj mordis la preterkurantajn virojn kaj virinojn. Komence de la *tubo*, kiel tiu strato estis nomata de la germanoj aŭ *ĉielira aleo* aŭ *vojo sen reveno* de la „laborjudoj“, troviĝis indikilo kun surskribo „Al la banejo“. Gardistoj de la „banejo“ kriis cinike: „*Marsch!*“ *Schneller, schneller! Pli rapide, pli rapide, la akvo fariĝos malvarma, kaj aliaj homoj ankaŭ volas duŝi sin!*“, batis la homojn per vipoj, pafilkolboj, feraj stangoj kaj gastuboj, tiel ke la viktimoj kvazaŭ fuĝis de si mem for de la gardistoj, kaj eĉ forprenis de ili mantukon kaj sapon. Okazis, ke la pli fortaj homoj puŝis la malfortajn sur la flankojn. Ekzistis homoj, kiuj eĉ petegis, ke oni estingu ilian vivon, por ke la turmentado trovu sian finon. La vekrioj de la homoj estis aŭdeblaj ankaŭ en aliaj zonoj de la koncentrejo; ili estis tiel laŭtaj, ke la loĝantoj de la plej proksimaj vilaĝoj fuĝis naŭzitaj en la arbaron.

En sia du parto la tubo havis neatenditan rektangulan kurbon, tiel ke la viktimoj ekvidis la konstruaĵon de la gasĉambroj nur en la plej lasta momento, kiam ĉio estis jam tro malfrua. Ie antaŭ la gasĉambroj staris orkestro de tri muzikistoj, kiuj ludis sur siaj instrumentoj. Wiernik parolis pri makabra procesio, kiu preterpasis tra la tubo.

Antaŭ ol eniri la gasĉambrojn la mortkondamnitaj devis fordoni siajn eventule kaŝitajn personajn dokumentojn, pasportojn, identigilojn kaj insignojn ĉe la t.n. *kaso*, kiu konsistis el ligna budo kaj troviĝis rekte ĉe la limo al la mortiga zono de la supra lagro. Ĉi tie okazis la plej lasta akto de la prirabado de la judoj, kiuj devis ĵeti en lignajn kestojn paperan monon, monerojn, horloĝojn, ringojn, orelajn ornamaĵojn, broĉojn, juvelojn. Iu voĉo ordonis: „*Achtung! La kaŝado de valoraĵoj estas punita per la morto!*“ Ĉi tie la SS-uloj forŝiris ringojn de la manoj de la homoj, frakasante iliajn ostojn, ĉi tie oni senigis la judojn de siaj orelaj ornamaĵoj, disŝirante ilian orelan lobeton. La germanoj trovis ĉion, kaj ĉe la vivantoj kaj ĉe la mortintoj. Ĉi tie la spuroj de la viktimoj, kiuj perdis siajn nomon kaj identecon, fakte ĉion kion ili posedis, kaŝis aŭ konservis, estis forviŝitaj.

En la ĉirkaŭaĵo videblis montoj de tero, kiuj leviĝis super la amastomboj, kaj gigantaj dragmaŝinoj,<sup>33</sup> kiuj laŭte bruis por ŝoveli tunojn da flavkolora sablo el la kondamnita tero de Treblinka. Polvo kirligis alten inter tero kaj ĉielo. Super la koncentrejo konstante pendis malagrabla dolĉetaodoro de putrantaj kadavroj, tiel ke eĉ la komandantejo en Ostrów plendis. Aŭdeblis obtuza bojado de germanaj ŝafhundoj.



## X *Sojle de la gasĉambroj*

La *tubo* finiĝis kelkajn metrojn antaŭ la konstruaĵo kun la gasĉambroj. La plej lastajn metrojn de la vojo al la gasĉambroj ornamis belaj potplantoj. Fine de la tubo antaŭ la viktimoj, kiuj perpleksiĝis aŭ rigidiĝis, subite leviĝis bela, ligne enpakita brikŝtona (tegola) konstruaĵo, kiu havis kvin larĝajn betonajn ŝtupojn, kiuj kondukis al vasta, granda pordo, antaŭ kiu kreskis plantoj. Ĉe la enirejo pendis malhela ruĝa kurteno, kiu probable estis ŝtelita el nekonata sinagogo. Sur ĝi legeblis la hebrea frazo „Tio estas la kluzo al dio, kiun trairos la justaj homoj“. La Davida stelo 'ornamis' la tegmenton de la pordo kaj faris, ke la domo aspektis kiel eksmoda sinagogo.<sup>34</sup> Antaŭ la koridoro de la gasĉambroj pendis la sinagoga rado. Ĉio havis sian simbolan signifon pure cinikan.

Ĉe la enirejo staris du ukrainaj gardistoj, kiuj respondecis pri la enpuŝado de la judoj en la konstruaĵon kaj en la gasĉambrojn. La unua ukraino estis armata per fera stango aŭ pafilo, la alia estis ekipata per glavo aŭ sabro. Laŭ rakonto de Samuel Willenberg<sup>35</sup> temis pri Ivano kaj Nikolao, la plej fifamaj ukrainaj gardistoj de Treblinka. Ivano<sup>36</sup> estis granda kaj ŝajnis esti milda kun siaj afablaj okuloj. Nikolao estis malgranda kaj magra, kun malicaj okuloj. Ambaŭ estis enorme brutalaj, sadismaj kaj primitivaj tipoj. Matthes observis, kiel la plej lastaj starantoj en la vico por eniri la gasĉambrojn estis krude enpuŝataj de tiuj ukrainaj gardistoj per la kolboj de iliaj pafiloj, ofte ili estis mortigitaj per iliaj bajonetoj, ĉar la viktimoj komprenis, kio okazos kun ili.<sup>37</sup> Eli Rozenberg memoris la konduton de tiu Ivano jene: „Tiu ukraino havis specialan plezuron turmenti homojn, precipe virinojn. Li pikis nudajn virinajn femurojn kaj seksorganojn per glavo antaŭ ol ili eniris la gasĉambrojn kaj seksperfortis junajn virinojn kaj knabinojn. La orelojn kaj nazojn de maljunaj judoj, kiuj ne plaĉis al li, li kutimis fortranĉi. Se iu ne agis laŭ lia kontenteco, li kutimis bati la kompatindan homon per metala pipo kaj rompis lian kranion. Aŭ li pikis lin per sia tranĉilo. Li aparte ŝatis ĉirkaŭvolvi la kapon de homoj per pikaj dratoj kaj bati ĝin, kiam ĝi estis kaptita de la dratoj. Kiam la viktimo tordiĝis pro doloro kaj volis forkuri, li estis strangolita de la dratoj.“

Post certa signo flanke de la gardistoj, kiu signifis, ke la gasĉambroj estas liberaj kaj pretaj por akcepti la venontan grupon, la viktimoj estis pelataj en la konstruaĵon de la gasĉambroj, kiu jam situis en la eksterma zono. Malgraŭ paniko kaj timo, kiuj kaptis la judojn jam survoje al la gasĉambroj, Matthes observis, ke la judoj eniris en la gasĉambrojn sen rezisto.

## XI *La gasĉambroj*

En la komenco ekzistis ruĝkolora tegola konstruaĵo kun *tri* gasĉambroj, kiuj estis 4 x 4 metrojn grandaj kaj 2,6 metrojn altaj (laŭ Arad), aŭ 5 x 5 m kaj 1,90 m (laŭ Wiernik). Tiuj gasĉambroj havis komunan surfacon de 48 kvadrataj metroj kaj estis konstruitaj de „fakuloj“ de la *Operaco T4*<sup>38</sup> laŭ la modelo de la koncentrejo Sobibór.

En kunligita ejo fine de la koridoro staris du dizelmotoroj, kiuj devenis de sovetia tanko, kiujn la germanoj konfiskis kaj kiuj produktis la venenan karbonan monoksidon por la gasĉambroj. La gaso estis enkondukata en la ĉambrojn tra specialaj feraj tuboj ĉe la plafono de la konstruaĵo, kiuj distribuis la gason tra malgrandaj truoj, kiuj estis kaŝitaj kiel duŝiloj. La muroj de la ĉambroj, kiuj estis 1,6 metron altaj, estis kovrataj de blankaj kaheloj, kaj la plankon kovris krudaj slaboj. En la gasĉambrojn oni eniris tra ligna koridoro kaj apartaj pordoj, kiuj mezuris 1,8 x 0,90 metrojn. La pordoj povis esti hermetike fermitaj. Ĉe la ekstera muro de la gasĉambroj troviĝis malŝarĝaj, ligne ĉarpentitaj pordoj, kiuj mezuris 2,5 x 1,8 metrojn, kiuj povis esti suprenlevitaj kaj estis apogitaj sur lignaj balkoj aŭ feraj stangoj por eltiri la mortajn homojn. En la gasĉambroj mem lampoj ne ekzistis, kaj kiam la pordoj estis fermitaj, la lumo en la konstruaĵo estis elŝaltita. Unuopa gasĉambro povis akcepti 400-600 homojn.

Pro la senfina amasego de homoj, kiuj estis transportitaj al Treblinka por esti gas-mortigitaj, la kapacito de la tri gasĉambroj baldaŭ ne plu sufiĉis, tiel ke la 'laboro' en la supra lagro kolapsis en aŭgusto 1942, kaj la kadavroj amasiĝis ne plu 'prilaborataj' en la koncentrejo en neeltenebla maniero. En la komenco, neniu emis forigi tiujn kadavrojn por purigi la lokon. Ĉar la malnovaj gasĉambroj ne plu sukcesis digesti tiun enorman kvanton de gasumotaj homoj, okazis ke multaj judoj devis atendi du tagojn ĝis kiam ili povis esti gasumitaj. Tial, Franz Stangl postulis la starigon de nova konstruaĵo kun pli multaj kaj pli grandaj gasĉambroj. Por kaŝi la veran intencon de la projekto, oni parolis pri konstruado de „banejo“, sed la konstruistoj, inter kiuj troviĝis Jankel Wiernik, kiu alvenis en Treblinka la 23a aŭ 24an de aŭgusto, baldaŭ komprenis, ke temas pri konstruaĵo kun gasĉambroj.

La kvin ĝis dek novaj gasĉambroj,<sup>39</sup> kiuj estis konstruitaj en aŭgusto kaj septembro 1942 en nova pli granda tegola konstruaĵo,<sup>40</sup> kune havis 320 kvadratajn metrojn, estis 7 x 7 aŭ 7 x 8 (4 x 8 laŭ Arad)

metrojn grandaj kaj povis akcepti ĝis po 1000-1200 homojn, aŭ kune 3800 homojn (aŭ 2300 en kazo de nur ses ĉambroj). Kompare kun la kapacito de la malnovaj gasĉambroj, la novaj gasĉambroj povis gasumi la sepoblan kvanton de homoj. La konstruaĵo havis koridoron kun po tri ĝis kvin ĉambroj je ĉiu flanko, kiuj estis 60 centimetrojn pli malaltaj ol la malnovaj. Granda problemo de la malnovaj gasĉambroj estis, ke la infanoj ne sufokiĝis, ĉar la gaso leviĝis al la plafono. Tiun cirkonstancon necesis konsideri en la planado de la novaj gasĉambroj, pro kio la novaj gasĉambroj devis esti konstruitaj pli malaltaj. La konstruado de tiuj novaj gasĉambroj, kiu estis efektiviĝita de kvardeko da judaj laboristoj, daŭris entute kvin semajnojn kaj estis gvidata kaj kontrolata de nazioj kaj ukrainoj, kiuj mistraktis la judajn laboristojn, tiel ke ĉiutage kelkaj el ili mortis. Suicidoj okazis ne malofte. Se iu „laborjudo“ protestis aŭ ribelis aŭ atakis iun germanon, li estis tuj mortpafita. Dum la konstruado de la novaj gasĉambroj alvenis ĉiutago transporto kun novaj viktimoj, kiuj vidis la konstruejon kaj estis pelataj preter ĝi al la malnovaj gasĉambroj.

Tiel, ekde septembro 1942 la koncentrejo de Treblinka havis du konstruaĵojn kun gasĉambroj, kiuj staris unu apud la alia, kun entute dek tri gasĉambroj. Post kiam la novaj gasĉambroj estis 'inaŭguritaj', la malnovaj gasĉambroj estis transformitaj al laborejo por tajloroj kaj dume ĉesis funkcii. Sed por povi digesti la grandegan kvanton de gasumotaj homoj el dudek trajnvagonoj, oni utiligis la kapaciton de la malnovaj kaj novaj gasĉambroj kune, tiel ke povis esti mortigitaj kelkdek mil homoj samtempe! Tiel, Wiernik fariĝis atestanto pri 10-12'000 gas-mortigitaj homoj ĉiutage, kaj Stangl poste konfirmis, ke dum lia ĉeesto ene de tri horoj estis gas-mortigitaj tri mil homoj, aŭ 12'000 ĝis 15'000 ene de dek kvar horoj. Nature, la maksimuman efikon la mortmaŝino de Treblinka atingis, kiam funkciis 13 gasĉambroj kune.

## **XII Mortado en la gasĉambroj**

Ĉar la gasĉambroj aspektis kiel duŝejoj, multaj homoj, kiuj troviĝis en tiuj ĉambroj, ne tuj komprenis, ke temas pri gasĉambroj, ĉar probable ĝis la plej lasta minuto oni ne povis kredi tion vera. Kiam la gasĉambroj estis plenaj de homoj, kiuj devis levi siajn brakojn alten, ĉar mankis spaco, sekvis la ordono „Akvon!“ kaj la personalo, ekzemple SS-ano *Franz Schmidt* aŭ la du ukrainoj Ivan kaj Nikolao, enŝaltis la dizelmotorojn. Ĉe la gasĉambroj laboris ankaŭ Marĉenko kaj Ŝalajev. La tuboj, kiuj estis ligitaj kun tiuj motoroj, transportis la venenan karbomonoksidon tra la duŝiloj en la gasĉambrojn, kie la viktimoj enspiris ĝin.

La gaso paralizis la spirorganojn de la homoj. Pro manko de spaco kaj aero multaj sufokiĝis jam antaŭ la alveno de la gaso. La rapideco de la mortado dependis de la kvanto de gaso, kiu atingis la ĉambrojn. Ĉar antaŭ la mortigo la homoj kutime terure panikis, en la gasĉambroj ili ĉirkaŭtenis unu la aliajn, tiel ke la brakoj kaj kruroj de iliaj kadavroj estis dense interplektitaj. Ĉar la dizelmotoroj ofte ne bone funkciis, la viktimoj devis elteni sufiĉe longan doloron antaŭ ol ili sufokiĝis. Ankaŭ okazis, ke la viktimoj estis lasitaj vivaj dum tuta nokto en la gasĉambroj antaŭ ol la motoro estis enŝaltita. La gasumado en la malnovaj gasĉambroj daŭris 20-30 minutojn, dum en la novaj, pli 'modernaj' gasĉambroj la procezo daŭris ĝis 45 minutoj. De tempo al tempo gardisto rigardis tra la specialaj fenestroj en la gasĉambrojn por kontroli la aktualan situacion kaj por certiĝi, ĉu ĉiuj homoj mortis.

La kadavroj troviĝis en diversaj statoj: La homoj, kiuj pereis en la malnovaj gasĉambroj, mortis pli rapide kaj pli 'facile'. Iliaj vizaĝoj estis flavaj kaj montris kvazaŭ-dorman mienon, la okuloj estis fermitaj kaj nur malofte la buŝo estis misformita; sur la lipoj troviĝis ŝaumo miksitaj kun sango. La kadavroj estis kovritoj per ŝvitaĵo. Antaŭ ol morti ili pisis, kakis kaj vomis. La homoj, kiuj pereis pli malrapide en la novaj, pli grandaj gasĉambroj, spertis teruran transformiĝon de la korpo: La korpoj ŝveliĝis kaj havis bluan koloron, la vizaĝoj estis tute nigraj kvazaŭ ili estis forbrulintaj. Pro manko de spaco, la mortintoj ne falis sur la plankon sed restis starantaj, apogante unu la aliajn, tiel ke la kadavroj formis unusolan komunan materion el karno. La viktimoj travivis krampojn kaj spasmon kaj konvulsie kunmordis la dentojn, tiel ke estis malfacile disŝiri la makzelojn por forpreni la orajn dentojn. Ĉe kelkaj kadavroj tute ne eblis malfermi la buŝon. Wiernik priskribis la unikan situacion de la mortintaj judoj jene: „Ili ĉesis krii, oni tranĉis ilian vivfadenon. Ili ne plu havis bezonojn aŭ dezirojn. Eĉ en la stato de la morto la patrinaj forte tenis siajn infanojn en la brakoj. Ne plu ekzistis amikoj aŭ malamikoj. Nenia ĵaluzo. Ĉiuj estis egalaj. Ankaŭ ne plu ekzistis beleco aŭ malbeleco, ili ĉiuj estis flavaj pro la gaso. Ankaŭ ne plu ekzistis riĉuloj kaj malriĉuloj, ĉar ili ĉiuj estis egalaj antaŭ la trono de Dio.“

### **XIII Post la gasumado**

Post la gasumado alkuris speciala grupo de „laborjudoj“, kiuj malfermis la eksterajn lukojn de la gasĉambroj (laŭ Matthes ukrainaj gardistoj malfermis ilin) kaj eltiris la kadavrojn por meti ilin sur iun ramplon, kiu estis 80 centimetrojn alta. Ĉar la glitaĵo inter la ramplo kaj planko estis dekliva, la kadavroj ruliĝis aŭtomate malsupren por povi esti akceptitaj kaj ŝarĝitaj sur specialaj ĉaroj, kiuj veturis sur aparta mallarĝa relo rekte al la amastomboj.

Kiam la pordoj estis malfermitaj, multaj homoj ankoraŭ duone vivis kaj devis esti mortigitaj per pafado aŭ fortaj batoj. Precipe la infanoj montriĝis plej rezistaj. La eltirado de la mortaj judoj el la gasĉambroj kaj la disigo de la kungluitaj kadavroj evidentiĝis malfacila kaj peza tasko.

Post la alveno ĉe la amastombejo, la ŝarĝvagonoj estis malplenigitaj kaj resenditaj por ricevi novajn kadavrojn. Sur la malpura tero devis esti metita nova sablo, por ke oni ne vidu la sangajn spurojn, kaj ankaŭ la gasĉambroj mem devis esti lavitaj kaj purigitaj kaj la muroj freŝe ŝmiritaj per kalko antaŭ ol ili povis ‘akcepti’ novan grupon de mortigotaj homoj. La „dentistoj” devis elrompi la orajn dentojn de la mortintoj, purigi kaj ordigi ilin. La nelavitaj dentoj terure odoraĉis. Per lutilo oni elfandis la kaŭĉukon. Vintre estis pli malfacile eltiri la dentojn. Post tiu ‘laboro’ la kadavroj devis esti ĵetitaj en la amastombon, kiu estis ĝis 50 x 25 metroj granda kaj 10 metrojn profunda. La ĵetado de la kadavroj en la amastombon estis efektivigita de aparta grupo, kaj deko da aliaj ‘laboristoj’ staris en la tombo mem por dismetadi la korpojn tiel, ke en la foso oni povis trovi lokon por kiel eble plej multaj kadavroj. Tre malagrabra efiko de la ĵetado de la sangantaj kadavroj en la amastombon estis, ke iliaj korpoj krevis. Alia grupo disĵetis kloron kaj sablon sur ĉiun tavolon de kadavroj por prepari novan tavolon. La amastomboj restis malfermataj kaj atendis ĉiam novajn kaj novajn ‘loĝantojn’. Se la foso estis plenplena de kadavroj, ĝi estis fermita.

Tiel, la tuta neniiga proceduro ekde la alveno de la viktimoj en Treblinka ĝis iliaj gasmortigo kaj posta entombigo povis daŭri 1-2 horojn.

### **XIV Kolapso kaj reorganizado de la koncentrejo**

Kiam fine de aŭgusto 1942 estiĝis totala kaoso en la koncentrejo, t.e. kiam la mortiga maŝino de ‚Treblinka II’ subite kolapsis kaj miloj da kadavroj ne povis esti enterigitaj kaj kuŝis ĉie sur la placoj de la koncentrejo aŭ inter la bariloj, kie ili estis mortpafitaj de la gardistoj de la kontrolturoj, la ĉefoj en Berlino fariĝis malkontentaj kaj postulis efikan reordigon kaj reorganizon de la koncentrejo. Tiucele, la 28an de aŭgusto la transportoj el Varsovio estis interrompitaj, kaj ĉiuj ĝisnunaj „laborjudoj“, kiuj estis engaĝitaj en la eksterma zono, estis likviditaj de la nazioj, ĉar ajna kontakto inter la judoj, kiuj ‘laboris’ en la eksterma zono kaj en la malsupra lagro, estis strikte evitinda, kaj grupo de laborjudoj, kiuj estis dungitaj en la akcepta zono, estis translokitaj al la eksterma zono. La ordono de Himmler konsekvencis la reorganizon de la administrado de la koncentrejoj, kiuj devis akceli la neniigon de la judoj en pli mallonga tempo. Tiam en Treblinka aperis SS-Obersturmgvidanto *Christian Wirth*,<sup>41</sup> kiu komandis la neniigejon en Bełżec, kaj reorganizis la koncentrejon de ‚Treblinka II’, pri kiu Eberl perdis la superrigardon; al tiu reorganizado apartenis la konstruado de pli grandaj kaj pli efikaj gasĉambroj, kiel priskribite en la antaŭa ĉapitro.

Franz Suchomel fariĝis atestanto kiel Wirth, kiu funkciis kiel inspektisto de la *operaco Reinhard(t)*, donis instrukciojn pri kiel la judoj estu likviditaj: kiel malfermi la pordojn de la vagonoj, kiel malŝarĝi la judojn, kiel peli ilin tra la tubo, kiel kaj kiam la judoj devas kunbindi siajn ŝuojn, ktp. Entute, Wirth estis karakterizita de Suchomel kiel eksterordinare brutala, fia kaj senkompata tipo, tiel ke oni nomis lin „Kristiano la Terura“ aŭ „La sovaĝa Kristiano“. En la mondkoncepto de Wirth, homoj, precipe judoj, kiujn li nomis „rubaĵo“, havis neniun valoron kaj devis malaperi kiel eble plej rapide. Suchomel eĉ kredis, ke Wirth devis esti perversa, ĉar en ĉiu okazo li batis la ukrainajn gardistojn per sia vipo, kiujn li nomis lin „Stuka“, laŭ speciala germana ataka aviadilo.<sup>42</sup>

Alia problemoj estis la regulaj trajnoj, kiuj veturis sur la linioj, sur kiuj veturis ankaŭ la trajnoj de la deportitoj, kaj kiuj kaŭzis ŝtopiĝojn kaj malfruiĝojn. Tial, por doni la prioritaton al la trajnoj por deportitoj, oni decidis, ke ekde la unua de septembro la linio tra Treblinka estu fermita por la normala trajntrafiko. Tio estis necesa ankaŭ por garantii la sekretecon de la operaco.

Nova komandisto en Treblinka (septembro 1942 ĝis aŭgusto 1943) fariĝis SS-ĉefsturmgvidanto *Franz Stangl*<sup>43</sup>, aŭstra policisto, kiu antaŭe deĵoris en Sobibór. Stangl estis karakterizita kiel trankvila viro, kiu persone mistraktis neniun homon. Aŭ li sidis en sia oficejo aŭ plenumis sian rutinan laboron, kiun oni atendis de li. Al tiaj rutinaj administraj kaj kontrolaj ‘laboroj’ en la koncentrejo apartenis la

inspektado de la fazoj de la neniigo de la judoj en la gasĉambroj, de la elfosado de la kadavroj en la amastomboj, poste ankaŭ de ilia bruligado sur la ŝtiparoj.<sup>44</sup> Krom tio, li kontrolis la eksteran fortikigon de la koncentrejo. Li ordonis ankaŭ la starigon de loĝbarakoj por la restado kaj dormado, de bakejo kaj kuirejo. La judajn laboristojn li admonis, ke ili pli intense laboru kaj ne pensu pri forfuĝo. La apatio kaj ciniko de Stangl estis totalaj: Kiam la novaj gasĉambroj estis finkonstruitaj, li komentis, ke li estas kontenta, ke „la juda urbo (aŭ juda ŝtato) estas fin(konstru)ita“. Fakte, Stangl estis sufiĉe malofte videbla en la koncentrejo, kiun li mastris, kaj li evitis la kontakton kun la homoj, kiuj ĉirkaŭis lin. Estri tian koncentrejon ŝajnis esti la ideala laborloko por homo kiel Stangl, kvankam murdi homojn eble ne troviĝis inter liaj ĉefaj motivacioj, ŝatokupoj kaj celoj. Li klopodis nur plej bone plenumi la ordonojn, kiujn li ricevis. Io alia ŝajne ne interesis lin. Kiam Stangl feriadis, li estis anstataŭata de SS-Oberschergvidanto *Ernst Schemmel*, kiu 'laboris' en Belzec. Sed la unua anstataŭanto de Stangl estis Kurt Franz, pri kiu ni ankoraŭ parolos poste.

La 3an de septembro 1942 la transportoj el Varsovio rekomenciĝis starti al Treblinka, kaj la sekvan tagon en la koncentrejo alvenis la unua trajno. Wirth kaj Stangl persone atendis la 'novajn' viktimojn ĉe la ramplo. La 'laboro' povis esti rekomencata, kun la nova infrastrukturo ĉi-foje eĉ pli efike. Ĉirkaŭ la 10an de septembro ĉesis alveni regulaj transportoj el Varsovio.

Laŭ atestantoj, *Lidia Zamenhof* estis lastfoje vidita la 5an de septembro 1942, kiam la nazioj pelis kelkmil judojn el la varsovia geto sur la „Umschlag“-placon. El tiu amaso la nazioj elektis kelkcent homojn por la deportado al la „oriento“. Ŝajnas, ke ankaŭ Lidia troviĝis inter tiuj malfeliĉuloj, kiujn oni pelis en la trajn-vagonojn por transporti ilin al Treblinka. La atestantino, tiama 14-jara Eva Toren, observis, ke Lidia „marŝis reĝmaniere, rektstature, kun fiero, malsame al la plimulto de aliaj viktimoj, kiuj estis kompreneble panikitaj“.<sup>45</sup> Poste la spuroj de Lidia perdiĝis. Ĉu ŝi ankaŭ „reĝmaniere, rektstature, kun fiero“ marŝis tra la tubo de 'Treblinka II' en la gasĉambron aŭ ĉu ŝi pereis alimaniere, ne estas klare kaj verŝajne neniam fariĝos konate. Se Lidia Zamenhof ne pereis jam antaŭe dum la deportado en Varsovio, dum la transporto al Treblinka aŭ ĉe la alveno en la koncentrejo, se ŝi ne duonviva atingis la koncentrejon kaj estis mortpafita post la alveno, ĉar ŝi ne eltenus la proceduron, kiu atendus ŝin surloke, aŭ se ŝia (morta) korpo ne estis forĵetita en unu el la fosojn de la koncentrejo por bruligado (ĉiuj tiuj kaj eble ankoraŭ aliaj variantoj estas principe eblaj), ŝi estis same pelita tra la barakoj kaj la „tubo“ en la gasĉambron kaj trovis sian heroan morton tie. Ni ne povas scii tion kaj plej verŝajne neniam ekscios kio vere okazis kun ŝi. Krom Lidia, ankaŭ *Zofia Zamenhof* (nask. 1889), filino de L.L. Zamenhof, kaj *Ida Zimmermann-Zamenhof* (nask. 1879), plej juna fratino de L.L. Zamenhof, estis senditaj al Treblinka, kie ili pereis. Filo Adam Zamenhof estis mortpafita de la nazioj en Varsovio.<sup>46</sup>

Esperantistoj Lidia, Zofia kaj Ida Zamenhof kaj Izrael Lejzerowicz, kiuj pereis en aŭ survoje al Treblinka

Inter la 3a kaj 12a de septembro ĉirkaŭ 52'000 judoj el la varsovia geto estis mortigitaj en Treblinka. La plej lasta transporto el Varsovio alvenis la 21an de septembro kun 2200 judoj inkluzive la judan policon, kiu partoprenis (devis partopreni) en la deportado de siaj samgentanoj de la varsovia geto. Tiel, inter la 23a de julio kaj 21a de septembro 1942 entute 254'000 judoj el la varsovia geto, poste ĝis novembra mezo 438'600 kaj ĝis aprila fino 763'000 homoj, ĉefe judoj el la getoj de la Ĝenerala Gubernio, do el la distriktoj de Varsovio, Radom, Lublin, Bjalistoko, krome Terezín (Theresienstadt), estis likviditaj en la neniigejo de Treblinka.

Cetere, inter nur malmultaj virinoj, kiuj entute postvivis la inferon de Treblinka, troviĝis *Sonia Lewkowicz*, kiu estis deportita el Dombrowa, Pollando, kie ŝi naskiĝis en 1922, al Treblinka en decembro 1942. Ŝi estis la sola virino, kiu laboris en la „mortlagro“ kaj restis viva, dank' al la cirkonstanco, ke alia judo anoncis ŝin ĉe SS kiel lavistinon. Naŭ monatojn post sia deportado ŝi sukcesis eskapi la neniigejon dum la ribelo en aŭgusto 1943.<sup>47</sup>

Plej verŝajne, al Treblinka estis deportita ankaŭ la fama pol-juda kuracisto kaj pedagogo *Janusz Korczak* (kiu fakte nomiĝis Henryk Goldszmit), kies spuroj perdiĝas la 5an de aŭgusto 1942.<sup>48</sup>

## XV *Ukrainaj gardistoj kaj iliaj rilatoj kun la judoj*

La neniigejo ‚Treblinka II’ estis gvidata, komandata kaj administrata de trideko-kvardeko da germanaj kaj aŭstraj funkciuloj kun SS-uniformoj. Ilin ‚asistis’ centoj da ukrainaj gardistoj, kiuj respondecis pri la garantiado kaj kontrolado de la sekureco, la mortigo de la judoj kaj devis eviti fuĝadon kaj ribeladon de prizonuloj. Kelkcent (!) judaj helplaboristoj (t.n. ‚laborjudoj’) devis plenumi la malpuran laboron, t.e. mem organizi kaj efektivigi la neniigon de sia gento. Laŭ tia koncepto funkciis la ‚kunlaboro’ inter germanoj, ukrainoj kaj judoj en Treblinka kaj aliaj koncentrejoj de la ‚Generala Gubernio’! Post la plenumo de sia tasko la ‚laborjudoj’ estis regule likvidataj kaj anstataŭigataj per novaj laborfortoj, kiuj estis selektitaj por tiu ‚laboro’ post ilia alveno en la koncentrejo.

La ukrainaj gardistoj estis aŭ sovetiaj militkaptitoj, do fakte iamaj soldatoj de la Ruĝa Armeo, kiuj estis malliberigitaj de la germanoj, aŭ civiluloj, kiuj devenis de vilaĝoj de okcidenta Ukrainio, kiu pli frue estis okupata de Pollando, kaj kiuj pretis servi al la germanoj, kio por certa tipo de ‚sovaĝaj’ homoj sendube estis afero alloga kaj profitdona. La ukrainoj estis konataj pro tio, ke ili malamis kaj abomenis ĉiujn, kiuj troviĝis en ilia ĉirkaŭaĵo: polojn, blankrusojn, rusojn, kozakojn, kaj precipe judojn, des pli en okcidenta Ukrainio la antisemitismo estis forta kaj la admirado al germanoj granda. La ukrainaj gardistoj trapasis trejnadon en la fifama SS-labortendaro Trawniki, pro kio oni nomis ilin Trawnikianoj, Trawniki-viroj aŭ Trawniki-homoj. La ukrainoj, kiuj estis armataj per pafiloj, glavoj, tuboj kaj stangoj, gardis la pordegojn de la koncentrejo, fermis kaj malfermis la pordojn de la gasĉambroj kaj funkciigis la dizelmotorojn por enlasi la gason en la gasĉambrojn. En la ‚lazareto’ ili vartis la bruligejon, en kiun estis ĵetataj la kadavroj de la mortpafitaj judoj. Tiuj ukrainoj estis fakte pli similaj al sovaĝaj bestoj ol al homoj. La murdado de la judoj evidente faris al ili grandan plezuron kaj feliĉigis ilin. Elstare brutala tipo estis la ĉefo de la gardistoj, suboficiro Boris Rogoza. 66 nomoj de ukrainaj gardistoj de Treblinka estas konataj (vd. apendicon 2).

Inter germanoj, ukrainoj kaj judoj de la koncentrejo ekzistis plej diversaj (komplikaj) interrilatoj. Kun la judoj, kun kiuj kontakto en principo estis strikte malpermesata, la ukrainoj estis nur ‚afablaj’, kiam ili povis eltiri profiton de ili: ricevi oron kaj monon kontraŭ cigaredoj aŭ simile. Kiam la ukrainoj ekvidis oron, ili fariĝis tute frenezaj, ĉar ili apenaŭ povis imagi ĝian valoron. Sufiĉis doni al ili objekton, kiu brilis kiel oro kaj diri al ili, ke temas pri oro. Se judoj ribelis aŭ minacis ilin, la ukrainoj reagis furiozege pro ĉagreno kaj kolero. Iliaj vizaĝoj estis plenaj de krueleco kaj kaŭzis timon, abomenon kaj naŭzon ĉe tiuj, kiuj devis rilati kun ili. La ukrainoj, kiuj estis konsiderataj iel ege avidaj, aplikis metodojn de teroristoj kaj senhezite akaparis ĉion, kion ili povis ricevi aŭ kion oni donis al ili. Okazis ankaŭ, ke la ukrainoj devigis la judojn transdoni al ili la oron, kiam ili rimarkis, ke la judoj okupiĝas pri oraj aĵoj sen esti observataj de aliaj. Se la judoj rifuzis transdoni tiujn valoraĵojn al la ukrainoj, ili riskis esti mortigitaj de ili. Bando de ukrainoj ŝteladis la valoraĵojn de deportitoj el la deponoj, kie ili estis konservataj, aŭ la laborjudoj devis ŝteli la valoraĵojn de la deportitoj por la ukrainoj, kiuj malfermis la paketojn kaj inspektis la enhavon. Kiam judaj helplaboristoj estis deportitaj, la ukrainaj gardistoj enpenetris iliajn loĝejojn kaj rabis ilian oron. La ukrainoj bone kaŝis la rabitajn varojn, por ke ili povu prezenti al siaj familioj iun militan gajnon. Iuj el ili havis amikinojn en la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj volis regali ilin per iu donaco. Parto de la rabitaj valoraĵoj kutime estis transformita al alkoholaĵoj. La ukrainoj vendis ĉion, kion ili povis trovi (t.e. ŝteli) en la koncentrejo, ĉefe por havigi al si monon por aĉeti brandon, ĉar la ukrainoj estis teruraj drinkuloj. Inter la ukrainoj troviĝis ankaŭ kelkaj ‚dentistoj’, kiuj eltiris la orajn dentojn de la gas-mortigitaj judoj. Kompreneble, multaj oraj dentoj malaperis nerimarkite en la poŝojn de la ukrainoj. La germanoj observis la farojn de la ukrainoj kaj ofte forprenis de ili la aĵojn, kiujn la ukrainoj ŝtelis kaj akaparis. Se judoj estis kaptitaj dum sia ‚komercado’ kun ukrainoj, la puno estis drasta. Kiam unu el la germanoj rimarkis tion, la kulpo estis nete ŝovita al la judoj, kiuj devis timi kruelan punon, al kiu ili ofte preferis la morton, se antaŭe ili ne estis senprokraste mortigitaj. Wiernik vidis scenon, dum kiu unu el la kaptitoj, ĉe kiu oni trovis kolbason, estis ligita al paliso kaj devigita stari tie dum tuta tago en terura varmego. Sed ankaŭ povis okazi, ke ukrainoj estis punitaj de germanoj, se ili estis kaptitaj dum sia komercado kun judoj. En tiaj kazoj la judoj devis elteni la koleron de la ukrainoj. Se unu komplico estis mortigita, nova komplico daŭrigis la ‚komercon’. Tiel almenaŭ kelkaj judoj postvivadis la inferon.

En sia ‚libera tempo’ la ukrainoj, kiuj loĝis en la barakoj de la ‚Max-Biala-kazerno’, iris amuziĝi kaj diboĉi en apudaj vilaĝoj, kie ili utiligis ankaŭ publikulinojn senditajn el aliaj urboj. Eĉ okazis, ke la surlokaj kamparanoj disponigis al ili siajn filinojn kiel putinojn por ricevi parton de la oro aŭ mono, ĉar la ukrainaj gardistoj de ‚Treblinka II’ estis konsiderataj kiel ‚riĉuloj’.



Kiam la ukrainoj estis plenŝtopitaj per manĝaĵoj kaj sufiĉe trinkis, ili serĉis aliajn plezurojn. Kutime ili selektis judajn belulinojn el la alvenintaj transportoj aŭ kaptis nudajn preterpasantajn virinojn kaj seksperfortis ilin en siaj litoj, antaŭ ol 'akompani' ilin al la gasĉambroj. Wiernik rakontis, ke ekzistis maloftaj kazoj de virina heroeco, kiam unu el la perfortigitaj virinoj sukcesis mortigi unu el tiuj teruraj ukrainaj gardistoj.

## XVI *Franz kaj Barry*

En aŭgusto 1943 la nova komandisto de 'Treblinka II' fariĝis SS-Oberschar- kaj policgvidanto **Kurt Hubert Franz**.<sup>49</sup> Ĉi tiu germano, kiu estis membro de la SS-mortkapuloj, antaŭe aktivis kiel gardisto en la KC Buĥenvaldo kaj laboris kiel kuiristo en diversaj instalaĵoj de la eŭtanazia programo T4, por poste deĵori en la neniigejo Bełżec en Pollando. Pri sia alveno en 'Treblinka II' en somero 1942 Franz raportis jenon: „Estis fine de somero aŭ komence de aŭtuno 1942, kiam mi venis el Bełżec al Treblinka. Mi iris piede de la stacidomo de Małkinia al Treblinka [sic]. Kiam mi alvenis en la koncentrejo, estis malhele. Ĉie en la lagro troviĝis mortaj korpoj. Mi memoras, ke ĉiuj tiuj korpoj disverŝis sangon. La korpoj estis fortirataj tra la lagro far laborjudoj. Kiam mi alvenis en Treblinka, tie estis ankaŭ Wirth, Stangl kaj Oberhauser.“<sup>50</sup>

Fakte, en somero 1942 Franz esence kontribuis al la reorganizado de 'Treblinka II' sub la gvido de Wirth. Li transprenis la gvidadon de la ukrainaj gardistoj, kiuj estis „sovaĝa kompanio“, kiu devis esti disciplinata kaj soldatece edukata. Per sia aktiva maniero gvidi, kontroli kaj administri la laborojn de la koncentrejo, kriante, mistraktante, punante, batante kaj eĉ persone mortigante homojn, Franz akiris pli kaj pli vastajn influojn kaj povon en la koncentrejo kaj baldaŭ fariĝis la unua anstataŭanto de komandisto Stangl. Kurt Franz, kiu estis jide nomata „lalke“ (pupo) pro sia 'afabla' vizaĝo de bebo, estis la plej sadisma kaj kruela el ĉiuj komandistoj de Treblinka. Diference de Stangl, kiu estis trankvila, pasiva burokrato, Franz aktive cirkuladis kun granda plezuro tra la koncentrejo kaj aparte ŝatis vangofrapi la homojn kaj pafi per sia pistoleteto kontraŭ judajn prizonulojn. Li kutimis 'pluki' el la transportoj virojn kun barboj, kiujn li demandis, ĉu ili kredas je dio. Kiam li ricevis jesan respondon, li ordonis al la koncerna homo levi botelon kiel pafcelon, dirante: „Se via dio ekzistas, tiam mi pafos kontraŭ la botelon, kaj se li ne ekzistas, mi pafos kontraŭ vin.“ Kiel Wirth kaj Stangl, por kiuj la judoj signifis „rubajon“, Franz nomis ilin „malpuraĵo“, „merdo“, „hundoj“. Wiernik raportis, ke post kiam „laborjudoj“ kverelis kun ukrainaj gardistoj, Franz kutimis sendi ilin al la brulŝtiparo, kie ili estis kruele turmentataj kaj mortigitaj antaŭ ol iliaj kadavroj estis ĵetitaj en la fajron.

Kurt Franz kaj hundo Barry

Sed Kurt Franz famiĝis precipe pro sia hundo „Barry“, kiu estis same timata de la koncentrejanoj kiel ĝia mastro mem. Barry estis nigra-blanka miksaĵo kaj similis al San-Bernarda hundo. Lia grandeco estis komparebla kun tiu de bovido. Ŝajnas ke Barry antaŭe 'servis' en la labortendaro de Trawniki, kies komandisto Karl Streibel transdonis la hundon al Franz Stangl, kiu ricevis ĝin en Sobibór. Kiam Stangl translokiĝis al Treblinka, li prenis ĝin kun si tien kaj 'heredigis' ĝin al Kurt Franz, lia anstataŭanto kaj posteulo, kiu adoptis la hundon kvazaŭ sia filo kaj edukis ĝin per speciala trejnado. Pri la flegado de Barry devis okupiĝi ĉeĥa malliberulo (Rudolf Masárek, kiu estis duonjudo). Kompreneble, Barry ricevis pli bonajn manĝaĵojn ol la malliberuloj mem.

Laŭdire, Barry plenumis aŭtomate ĉiujn ordonojn de sia mastro. Oni rakontis, ke la hundo eĉ povis diveni liajn intencojn kaj tuj atakis iun celon, se Franz diris al ĝi la legendecajn vortojn „*Homo, kaptu la hundon!*“ („*Mensch, fass den Hund!*“<sup>51</sup>); tiam Barry senprokraste atakis la viktimon, kiu kutime estis judo aŭ judino, kies seksorganon ĝi danĝere mordis, aŭ elŝiris karnopecojn el la korpo, precipe ĉe la postaĵo aŭ abdomeno. Malfortajn homojn Barry kapablis ĵeti sur la teron kaj mortige dispecigi ilin tie. Viktimoj, kiuj estis atakitaj de Barry sed ne tuj mortis, estis mortpafitaj de Franz persone aŭ de alia ulo de la personalo. Tamen, Barry estis granda mistero. Ekster la influo de Franz ĝi estis tute trankvila kaj malagresema besto; atestantoj rakontis, ke en tiaj momentoj oni povis eĉ mankaresi kaj ŝerce provoki ĝin sen timi atakan reagon. Kiam la hundo estis forprenita de Franz kaj de Treblinka, lia konduto komplete ŝanĝiĝis kaj eĉ evidentigis la absolutan inverson de la trajtoj, kiujn ĝi montris en la koncentrejo. Nome,

tiu hundo fariĝis la plej maldanĝera kaj kvieta animalo, kiu estis imagebla. Post la fermo de Treblinka, Kurt Franz estis komandita unue al Sobibór, poste al norda Italio, kaj Barry estis transdonita al Friedrich Struwe, ĉefkuracisto de la germana rezerva lazareto en Ostrów, kiu situis 15 kilometrojn norde de Treblinka, kie Barry estis nomata „granda bovido“. Ĉe Struwe Barry kutimis sidi trankvile apud aŭ sub la skribotablo de la kuracisto, eĉ kiam centoj da nudaj soldatoj preterpasis, kiuj devis esti inspektataj. En 1944 Struwe alportis la hundon al sia edzino, kiu vivis en la lando Ŝlesvigo-Holstinio. Poste la frato de Struwe ricevis ĝin. Du jarojn post la militfino Barry estis endormigita pro kadukeco. Kiam Kurt Franz estis arestita en 1959 en Düsseldorf, oni trovis fotoalbumon kun bildoj pri Barry; la koncerna paĝo portis la titolon „belaj tempoj“. Pri Barry Franz rifuzis ĉiujn riproĉojn kaj akuzojn kiel „senhontan mensogon“ kaj asertis, ke Barry estis „bonkora kaj ludema“ hundo. Por pli bone kompreni la konduton de tiu hundo, la tribunalo en Düsseldorf<sup>52</sup> eĉ taskis la mondfaman zoologon kaj fiziologon Konrad Lorenz, tiama direktoro de la Max-Plank-Instituto por esplorado de kondutoj, verki ekspertizon pri „La konduto de la hundo Barry“ kun aparta konsidero de ties rilato al ĝia mastro. Lorenz konkludis, ke „la hundo estis spegula bildo de la subkonscio de sia mastro“, kaj klarigis, ke tia fenomeno estas observebla precipe ĉe rasaj miksaĵoj, kiuj estas pli sentemaj ol purrasaj hundoj. Tiaj hundoj kiel Barry do povas esti foje ege agresemaj, foje tute sendanĝeraj, ĉar ili adaptas sin al la kapricoj de sia mastro; krom tio, la karaktero de tia hundo povas tute sangiĝi, se ankaŭ la mastro ŝanĝiĝas. La suspekton de atestantoj, ke Franz speciale dresis la hundon por ataki la seksorganojn de malliberuloj, la tribunalo ne povis konfirmi, sed oni ankaŭ ne kontestis, ke Franz „ne malvolonte“ vidis tian konduton de sia hundo. Multajn jarojn poste oni miris pri la klopodoj de la tiamaj juĝistoj, kiujn ili faris por esplori tiajn detalojn. Iuj aŭtoroj poste eĉ elektis la legendiĝintan hundon Barry kiel temon aŭ motivon por siaj (beletraj) verkaĵoj.<sup>53</sup>

## **XVII *Aliaj funkciuloj de la koncentrejo***

Aliaj funkciuloj de Treblinka II eble estis malpli famaj ol la supre menciitaj ĉefaj komandistoj de tiu homa buĉejo, ĉar ili malfurore efektivigis la ordonojn de siaj ĉefoj kaj plenumis la ĉiutagan ‘laboron’. Sed certe ili ne estis malpli teruraj. Kelkaj ekzemploj:

*Kurt Küttner*, laŭ rango SS-Oberschergvidanto, estis la komandisto de la malsupra lagro kaj havis la taskon eviti, ke la prizonanoj kaŝu personajn objektojn.<sup>54</sup> Pro sia ekstrema brutaleco Küttner, nomata ankaŭ „Kiwe“ (aŭ „Kiva“), estis unu el la plej timataj SS-uloj, kiu kutimis kruele puni siajn ‘kunlaborantojn’ pere de senfinaj vesperaj apeloj, kiujn li gvidadis. Post Treblinka li estis sendita al Triesto.

*Otto Stadie*, nomata „Fesele“, SS-Stabschergvidanto, respondecis pri la laŭplana efektivigo de la fizika neniigo de la judoj. La maljunajn kaj malsanajn alvenintojn, al kiuj li rakontis, ke tie ili ricevos medicinan helpon, li sendis en la „lazareton“, kie ili estis mortpafitaj kaj ĵetitaj en la foston. Por fari ordon aŭ sufoki kontraŭstaron li mem kutimis pafi per sia revolvero kontraŭ homojn.<sup>55</sup>

Ankaŭ SS-Unterschergvidanto *Willi Mentz*, nomata „Frankenstein“ kaj laŭ profesio melkisto, laboris en la „lazareto“. La nombro de homoj, kiujn Mentz persone likvidis per pafo kontraŭ la nukon, ne povis esti ekzakte kalkulita, sed verŝajne temas pri centoj aŭ miloj da homoj kaj „laborjudoj“.<sup>56</sup>

SS-subgvidanto *August Miete*, nomata „mortanĝelo“, estis aparte multifunkcia sadisto: Li ne nur laboris en la „lazareto“, kie li likvidis grandan kvanton de judoj, kiuj estis aŭ ŝajnis al li maljunaj kaj malsanaj aŭ ne labor-kapablaj, per pafo kontraŭ iliajn nukojn. Li devis okupiĝi pri tio, ke la koncentrejo estu bone kaŝata de ekstere, kaj kontroli la laborojn sur la ordiga placo, kiu situis apud la stacidoma placo, kie la vestaĵoj de la viktimoj estis kolektataj kaj ordigataj. Krom tio, li laŭtkrie ordonis malfermi la vagonojn de la trajno, kiam nova transporto de judoj alvenis en la koncentrejo. Miete konfirmis, ke li (aŭ Willi Mentz) mortpafis centojn da judoj en la „lazareto“ kaj mortigis homojn, kiuj estis vunditaj post atako de la hundo Barry.<sup>57</sup>

*Franz Suchomel*, SS-Unterschergvidanto, sudeta germano el Bohemio, akceptis la alvenintajn transportojn kaj respondecis pri la konfiskado de judaj valoraĵoj. Li gvidis la laboron de la tiel nomataj „oraj judoj“, kiuj devis kolekti la monon kaj oron trovitajn ĉe la judoj. Suchomel pelis la virinojn en la gasĉambrojn, funkciis kiel speco de „banejestro“, dirante al la viktimoj la fame cinikajn vortojn „pli rapide, la akvo iĝas malvarma“. Laŭ la memoro de Richard Glazar, Suchomel estis aparte timinda

sadisto, kvankam li savis kelkajn judojn de la sorto perej en la gasĉambroj.<sup>58</sup> En 1976 Suchomel donis sian difinon pri la mortfabriko de Treblinka: „Primitiva sed bone funkcia transportestablo (germ. Fließband) de la morto“.

SS-Unterschergvidanto *Gustav Münzberger*, alia sudeta germano el Bohemio, estis aparte brutala tipo. Komence li laboris en la malsupra lagro, kie li okupiĝis pri la alveno de la transportoj kaj la plukondukado de la viktimoj al la „lazareto“ kaj la gasĉambroj, en kiujn li enpuŝadis maksimuman kvanton de homoj per pistolo kaj vipo. En tio lia specialaĵo estis postjeti la infanojn en la gasĉambroj. Post la gasumado li ordonis al la koncerna taĉmento eltiri la kadavrojn el la gasĉambroj kaj fortransporti ilin al la fosoj. Krom tio, li kontrolis la dentaron de la kadavroj. Himmler aparte laŭdis tiun nazion, kiu laŭdire konsumis abunde alkoholon, kiel unu el la plej meritoplenaj partoprenantoj en la *operaco Reinhard(t)*.<sup>59</sup>

*Heinrich Matthes*, SS-Schergvidanto („serĝento“), kiu laboris kiel vira flegisto en pluraj hospitaloj, respondecis en Treblinka pri la „vivkondiĉoj“, la laborrapideco kaj la matena kaj vespera apeloj de la prizonanoj kaj estris la mortigan sekcion de la koncentrejo. Matthes posedis la liberan licencon bati kaj mortigi homojn, kaj li ankaŭ abunde utiligis tiun potencon sensente kaj laŭ „prusa“ maniero. Krom tio, li donis la ordonon fermi la pordojn de la gasĉambroj kaj eltiri kaj forporti la kadavrojn el ili post la amasmurdo.<sup>60</sup> Lia anstataŭanto estis SS-Unterschergvidanto *Karl Pötzinger*.

La tasko de SS-Schergvidanto *Josef Hirtreiter*, nomata „Sepp“, estis kontroli la senvestigadon de la judaj viktimoj en Treblinka kaj peli ilin tra la tubo en la gasĉambroj.<sup>61</sup>

*Albert Franz Rum*, SS-Unterschergvidanto, unue laboris en la malsupra lagro ĉe la „akcepto“ de la alvenintaj transportoj kaj poste en la supra lagro en la komando, kiu forportis la kadavrojn.<sup>62</sup>

*Otto Horn*, SS-Unterschergvidanto, laboris en la komando por kontroli la enterigon kaj bruligadon de la kadavroj.<sup>63</sup>

*Lorenz Hackenholt*, SS-Hauptschergvidanto, estis sendita al ‚Treblinka II‘ por la planado de novaj gasĉambroj laŭ la modelo de la „Hackenholt-fondaĵo“. <sup>64</sup> Pri la realigo de la konstruado de la novaj gasĉambroj respondecis SS-Hauptsturmgvidanto *Erwin Lambert*, kiu jam en la eŭtanazia *operaco T4* konstruis la gasĉambroj. Krom la gasĉambroj en Treblinka, li helpis konstrui ankaŭ diversajn barakojn, la pikildratan barilon ĉirkaŭ la koncentrejo kaj la munician bunkron.<sup>65</sup> SS-Schergvidanto *Erich Fuchs* kunkonstruis la gasĉambrajn instalaĵojn kaj estis konsiderata kiel la ĉefa „gasmastro“ de la *operaco Reinhard(t)*.<sup>66</sup>

Alia responsulo por la gasĉambroj flanke de SS nomiĝis *Fritz Schmidt*, kiu laboris en la dizelmotorejo de ‚Treblinka II‘, kie la gaso estis produktata por sufoki la judojn.<sup>67</sup>

Ceteraj SS-funkciuloj de la mortfabriko de Treblinka nomiĝis *Otto Richard Horn*, *Hermann Sydow*, *Karol Spezinger*<sup>68</sup>, *Ernst Stengelin*<sup>69</sup>, *Alfred Löffler*<sup>70</sup>. *Herbert Floss*<sup>71</sup>. Ĉi-lastaj gvidis la konstruadon de la ŝtiparo por bruligi la kadavrojn. Ĉu ĉe Hermann Sydow temis pri tiu gardisto, kiun Wiernik priskribis, ne estas certe. Laŭ tio temis pri ĉirkaŭ 50-jaraĝa homo, kiu estis granda kaj afabla. Laŭ Wiernik Sydow komprenis la tragikan sorton de la „laborjudoj“, kompatis ilin kaj afable traktis la „laborjudojn“, al kiuj li eĉ sekrete alportis iom da manĝaĵoj, kiujn li trovis en la kuirejo de la germanoj. Kiam unuafoje li vidis la amason de gasumitaj kadavroj li ŝokiĝis, rigardis ilin kun plena konsterniĝo kaj foriris. Kvankam Sydow elradiis sentojn de boneco kaj montris honestan karakteron, li neniam parolis kun la prizonuloj, ĉar li timis siajn kolegojn.

### **XVIII *Bruligado de la kadavroj***

Por inspekti la progreson de la *operaco Reinhard(t)* iam en februaro aŭ marto 1943 Regna gvidanto SS Heinrich Himmler vizitis kun dudeko da funkciuloj la koncentrejon de ‚Treblinka II‘, kiu estis detale prezentata al li fare de Franz kaj Stangl, kaj decidis forviŝi la spurojn de la amasmurdo per kremaciado de ĉiuj kadavroj, kiuj troviĝis en la amastomboj. La problemo estis, ke la kadavroj estis nur enterigitaj sed ne bruligitaj. Tiu ´projekto´ ricevis la nomon *speciala operaco 1005*.<sup>72</sup> La nazioj volis detrui ĉiujn pruvojn, kiujn la aliancanoj povus utiligi kontraŭ la germanoj. En majo 1943 Himmler ordonis la „cindrigo de la tuta orienta fronto“. Por efektivi tiun diablan planon alvenis en Treblinka fakulo pri kremacio, SS-Oberschergvidanto *Herbert Floss*, nomata „artisto“, kiu konstruis specialan ŝtiparon. La fundamenton de tiu ŝtiparo formis kvin aŭ ses trajnreloj, kiuj estis tridek metrojn longaj. Sub la relojn oni ŝovis lignon, kiu estis saturita per benzino. La „laborjudoj“ dismetis la kadavrojn laŭ tavoloj sur la ŝtiparon kaj bruligis ilin. En la komenco la flamigo de la kadavroj malbone funkciis, pro kio oni devis disverŝi grandan kvanton da benzino. Eĉ tiam la kadavroj malbone brulis. Tiun laboron plenumis speciala laborgrupo, nomata la „fajro-kolono“. La ŝtiparo estis ŝarĝita dumtage, kaj post la kvina horo vespere oni ekflamigis ĝin. Ne nur la novaj kadavroj estis bruligitaj sur tiu ŝtiparo. La judaj labor-taĉmentoj ricevis la ordonon elfosi ĉiujn enterigitajn kadavrojn kaj bruligi ankaŭ ilin sur la ŝtiparo. Tiu metodo ebligis bruligi milojn da novaj kaj malnovaj kadavroj samtempe. La malnovajn kadavrojn en la amastomboj elfosis grandaj dragmaŝinoj, kiuj povis elfosi ĝis 3000 kadavrojn en unu tago. La elfositaj kadavroj brulis pli bone ol tiuj, kiuj venis freŝaj rekte el la gasĉambroj. Ankaŭ montriĝis, ke la korpoj de la virinoj brulis pli facile ol tiuj de la viroj. Pro tio oni utiligis virinajn korpojn por akceli la fajron. La nova metodo estis konsiderata de la nazioj kiel plena sukceso. Pro tio oni simpligis kaj rapidigis la tutan proceduron. La novaj transportoj povis esti pli rapide traktataj per tio, ke la bruligo de la kadavroj sekvis tuj post la gasumado. Tiel estis traktataj ekzemple la judoj el Bulgario, Grekio kaj Jugoslavio, kiuj alvenis bone vestitaj.

Ĉar la afero urĝis, la germanoj konstruis pliajn ŝtiparojn kaj multigis la labor-taĉmentojn, tiel ke en unu tago oni povis bruligi ĝis 10-12´000 kadavrojn. Tiu aranĝo rezultigis gigantan inferon, kiu aspektis kiel vulkano, kiu sputis fajron kaj lafon. La ŝtiparoj laŭte krakadis. Pro la fajro kaj la enorma fumo ne eblis stari apude. Starante apud la neeltenebla varmego, la homoj perdis la konscion. Okazis, ke oni alportis virinojn kaj infanojn ĝis la ŝtiparoj, kie oni ĵetis ilin en la fajron. La infanoj panike ligiĝis al siaj patrinaj. La virinoj petegis indulgon, sed iliaj turmentantoj nur malice rikanis kaj lasis siajn viktimojn stari dum minutoj antaŭ ol ĵeti ilin vivantaj en la fajron. La turmentantoj ´motivaciigis´ la virinojn esti ´kuraĝaj´ kaj salti mem en la fajron post iliaj infanoj, kiujn oni jam ĵetis sur la ŝtiparon, mokante pri ili, ke ili estas malbravaj. Vintre, la murdistoj sentis sin bone apud la varmegaj ŝtiparoj, trinkante, manĝante kaj kantante.

Sed, ho ve, la bruligitaj kadavroj postlasis erojn de siaj korpoj. Speciala taĉmento devis forigi la cindron, kiu aperis sub la ŝtiparo kaj kolekti neforbrulintajn kapojn, brakojn kaj krurojn kaj dispecigi ilin. La cindro devis esti kribrita kaj liberigita de la plej malgrandaj osteroj, tiel ke ĝi fariĝu tiel fajna kiel cigareda polvo. Poste ankaŭ la cindro mem devis esti malaperigita. Unue oni klopodis transformi la cindron en ´teron´ per speciala fluidaĵo. Por fari tion eĉ estis vokitaj ´fakuloj´ de ekstere. Ĉar la rezulto de tiu ´eksperimento´ ne estis kontentiga, oni decidis malaperigi la cindron sub dikan tavolon de sablo. Eĉ la sango de miloj da mortigitaj ne povis trovi sian pacon – ĝi ŝveligis la teron kaj reaperis ĉe la surfaco. La judoj, kiuj devis elfosi la amastombojn, ne hezitis intence postlasi pecetojn de homaj restaĵoj, por ke poste la loko de la krimo povu esti trovita pli facile. Sed la germanoj bone atentis, ke ĉiuj spuroj de la amasmurdo estu forviŝitaj. Alia tasko de la „laborjudoj“ estis plenigi la malplenajn fosojn per la cindro de la bruligitaj kadavroj. La amastomboj estis fermitaj per du metrojn dika tertavolo. Kaj tiel la areo de la amastomboj estis ebenigita, post kiam oni elfosis kaj bruligis tri kvaronojn de la kadavroj. La resto sekvis iom poste. La elfosado de la kadavroj el la amastomboj kaj ilia bruligado kaj cindrigo daŭris ĝis la fino de julio 1943.

### **XIX *Ribelo kaj fino de Treblinka***

Ĉar la „laborjudoj“ sciis, ke oni mortigos ankaŭ ilin post la plenumita laboro de la bruligo kaj cindrigo de la kadavroj, maturiĝis ĉe ili la ideo de ribelo kaj amasfuĝo. Despli ke post la malvenko de la germanoj en Stalingrado kaj la malbona situacio de la germana armeo ĉe diversaj frontoj la kolapso de la Tria Regno estis antaŭvidebla. Gvidaj organizantoj de la subtera movado, kiuj preparis la ribelon, nomiĝis Julian (Ilya) Chorążycki, Marceli (?) Galewski, Zeev (Zvi) Korland, Zelomir (Zelo, Zialo) Bloch, Jankiel

Wiernik, Leon Haberman, Adolf Freidman, Ŝmuel Rajzman, Rudek Lubrenitski, Rudolf Masárek kaj aliaj. La ribelo devintus okazi jam en printempo 1943,<sup>73</sup> sed diversaj incidentoj prokrastis la efektivigon de la plano. En aŭgusto parto de la SS-anoj feris, kaj la ĉeestantaj germanoj kaj ukrainoj ne rimarkis la planon de la malliberuloj. En la tago de la ribelo mem parto de SS-uloj, inkluzive de Kurt Franz kaj la ukraina gardistaro, banis sin en la rivero Bug. En la posttagmezo de la 2a de aŭgusto 1943 Küttner estis mortpafita de Wallabanczik, kio estis (mis)komprenita de la KC-anoj kiel signalo por la komenco de la ribelo. Ekstis enorma konfuzo, prizonuloj ĵetis grenadojn, eksplodigis barakojn kaj komencis pafi. Barakoj komencis bruli, la fumo estis videbla de malpoksime. La pafado estis respondata de la germanoj kaj ukrainaj gardistoj, kiuj forkuris de siaj kontrolturoj aŭ povis esti forlogataj kaj mortigitaj de la ribeluloj. Stangl observis la okazaĵojn tra la fenestro de sia oficejo. Post kiam unua grupo sukcesis tranĉi la barilojn ĉirkaŭ la koncentrejo, kelkcent (eble 600) prizonanoj forkuris de la koncentrejo en la direkto de la densa arbaro, kiu troviĝis kelkajn kilometrojn for de la koncentrejo. Ukrainaj gardistoj persekutis la fuĝantojn kaj pafadis kontraŭ ilin. Multaj fuĝantoj pereis, sed kelkaj el ili tamen sukcesis forkuri, kiel ekzemple Jankiel Wiernik,<sup>74</sup> Richard Glazar,<sup>75</sup> Samuel Willenberg<sup>76</sup>, Chil (Jehiel) Rajhman<sup>77</sup>, Jerzy Rajgrodzki, Rajhman.<sup>78</sup> Ili sukcesis reveni al Varsovio kaj poste rakontis al la homaro kiel rektaj atestantoj de la holokaŭsto siajn spertojn kaj impresojn pri la ekstremaj kondiĉoj en la neniigejo de Treblinka. Iliaj konsternaj kaj ŝokaj tekstoj similas unu la aliajn kaj konfirmas la teruraĵojn, kiujn la judoj (kaj aliaj) travivis en Treblinka. La raportoj aperis libroforme kaj ne estas rekomendindaj al legantoj kun malfortaj nervoj. Malgraŭ tio, tiuj nekredeblaj tekstoj devus esti deviga legaĵo en ĉiu lerneja leciono pri historio. Dum tiu ribelo la koncentrejo estis grandparte detruita. Sed la ribelo ankoraŭ ne signifis la definitivan finon de 'Treblinka II'. Bedaŭrinde, la ribelantoj ne sukcesis detrui la konstruaĵon kun la gasĉambroj. En aŭgusto en 'Treblinka II' estis mortigitaj 7600 judoj el la bjalistoka geto. Nur post tio 'Treblinka II' ĉesis funkcii kiel murdfabrika, en oktobro 1943. Ĝiaj restaĵoj estis neniigitaj, la konstruaĵo de la gasĉambroj eksplodigita kaj ĉiuj ankoraŭ utiligeblaj instalaĵoj estis fortransportitaj. Franciszek Ząbecki, la „estro“ de la stacidomo de la vilaĝo Treblinka, observadis kiel centoj da trajnoj, ŝarĝitaj kun konstrumaterialoj, preterpasis la stacidomon kaj forlasis la regionon. Tiel, la koncentrejo de Treblinka malaperis kvazaŭ de si mem. La 17an de novembro 1943 Franz, Bredow kaj Mentz ordonis kaj aranĝis sian plej lastan murdon: La anoj de la juda resttaĉmento estis alportitaj al la rando de arbaro, kie ili estis mortigitaj per pafo kontraŭ la nukon. Ankaŭ ukrainaj virinoj, kiuj laboris en la kuirejo, estis likviditaj. Poste la ukrainaj gardistoj bruligis la kadavrojn sur ŝtiparo, kiu estis konstruita speciale por ili. Post farita laboro la nazioj veturis al Sobibór, kie Suchomel kun grupo de laborjudoj el Treblinka jam troviĝis por malkonstrui ankaŭ la tiean mortfabrikon. Stangl kaj la germana personaro de Treblinka estis translokita al Italio, kie la nazioj ricevis la ordonon ĉasadi la partizanojn kaj judojn ĉirkaŭ Udine, Triesto kaj Fiume/Rijeka ĉe la bordo de la Adriatika maro. Wirth estis mortigita de partizanoj.

Fumo de la brulanta koncentrejo dum la ribelo; Memorŝtonoj en Treblinka nuntempe (el Vikipedio)

## **XX Post Treblinka**

Poste, la parcelo, sur kiu staris 'Treblinka II', devis esti iel reutiligata. Oni limigis ĝin per pikildrato, aldonis pecon de tero de alia tereno kaj formis novan surfacon por traplugi ĝin. Tiu laboro estis plenumita de la kamparanoj de la najbara vilaĝo Wulka. La tero evidentiĝis eĉ fekunda, aperis pinoj, kiuj bele kreskis, ĉar la 'ĝardenistoj' inter la malliberuloj disemis lupenojn. Anstataŭ la koncentrejo, sur la teritorio de la iama mortfabrika estis konstruita farmbieno, kies fundamento konsistis el brikoj de la konstruaĵo de la gasĉambroj. En la domo vivis du iamaj ukrainaj gardistoj, „Strebel“ kaj „Sashka“, kun siaj familioj. Oni bredis ĉevalojn, bovinojn kaj porkojn kaj kultivis legomojn. La aliro al la bieno estis protektata per barilo por malhelpi al najbaraj vilaĝanoj traserĉi la teron de Treblinka je valorajoj. Kiam la Ruĝa Armeo alproksimiĝis, la loĝantoj bruligis la domon kaj forfuĝis.

Kio post la fermo de la koncentrejo okazis en Treblinka, notis Jan T. Gross en sia libro *Timo*:

„La unuan oficialan viziton al la teritorio de la iama neniigejo Treblinka faris pol-sovetia komisiono la 15an de septembro 1944 por esplori la germanajn krimojn. (...)

Sed en la sekvanta jaro nenio estis farita en tiu ĉi rilato. La venonta raporto el Treblinka devenis de Michał Kalembasiak kaj Karol Ogródowczyk, kiuj alvenis la 13an de septembro 1945 en Treblinka:



Post nia alveno ni renkontis tie, kie troviĝis la koncentrejo, elfositan kampon kaj traplugitan de la loĝantoj de la ĉirkaŭaĵo. En certaj lokoj ekzistis dek metrojn profundaj fosoj, inter kelkaj el ili elstaris partoj de homaj ostoj, tibioj, makzeloj, gamboj (la profundaj truoj venis de tio, ke la 'trezorfosantoj', inter kiuj troviĝis ankaŭ sovetiaj soldatoj de la flughaveno de Ceranów, kiuj eksplodigis ilin por atingi pli profundajn tavolojn de la tero el cindro kaj homaj restaĵoj). Sub ĉiu arbo estis truoj, kiujn la serĉantoj de oro kaj valorŝtonoj fosis. La odoraĉo de kadavroj kaj gaso estis tiel neeltenebla, ke mia kolego kaj mi devis vomi. Kiam ni daŭrigis promenadi sur la teritorio, ni rekontis homojn, kiuj elfosis la teron. Nian demandon 'kion vi faras ĉi tie tie?' ili ne respondis. En distanco de ĉirkaŭ 300 metroj, kie troviĝis la krematorio, ni rimarkis grupon de homoj kun ŝoveliloj, kiuj elfosis la teron. Kiam ili ekvidis nin, ili forkuris. Ĉiupaŝe oni trafis al homaj restaĵoj kaj aĵoj de la ĉiutaga bezono kiel ŝuoj de infanoj, viroj kaj virinoj, kuleroj, forkoj aŭ homa hararo de perukoj, kiujn la judinoj portis. (...) Mi miris, ke la loko, kiu pro la martireca morto de milionoj da senkulpaj homoj fariĝis konsekrita loko, ne estis sekurigita kontraŭ la marodadoj kaj la avido de la ĉirkaŭe loĝantaj kamparanoj. (...) Mi aldonas, ke en Treblinka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo regas nekredeblaj kondiĉoj. La loĝantoj, kiuj riĉiĝis per la oro el la fosoj, nokte prirabas la najbarojn. Ni multe timis. En iu kabano, nur kelkajn metrojn for de tiu, en kiu ni tranoktis, iu virino estis rostita super la fajro por devigi ŝin malkaŝi la lokon, kie ŝi konservis oron kaj valoraĵojn. Sekurecaj organoj ne ekzistas.'

Simile sonas la raporto de Rachela Auerbach, kiu vizitis Treblinkan en novembro 1945 laŭ iniciato de la ĉefkomisiono por esplori NS-krimojn. Ankaŭ ŝi renkontis multajn marodistojn kaj neeksplozintan municion, kiu estis utiligita por la elfosado de la tero. 'Pola Kolorado aŭ ora febro en Treblinka' tekstas la koncerna ĉapitro en ŝia libro, en kiu ŝi priskribis ĉion tion. Martyna Rusiniak citas kromajn fontojn, kiuj konfirmas la amasan partoprenon de la loka loĝantaro en la detruado de la mortkampoj de Treblinka. Eĉ la pastro de la najbara vilaĝo ne kondamnis tiujn farojn sed, male, konstatis 'ke temas pri judaj tomboj kaj ke oraj kronoj aŭ ornamaĵoj ne devus kuŝi en la tero.'

La venonta oficiala vizito okazis en 1947. Tiam oni decidis fondi komitaton por la sekurigo de la tomboj de la viktimoj en Treblinka. Tamen nenio tia okazis, kaj ĝis la venonta vizito pasis sep jaroj. Oni konstatis, ke la barilo, kiu estis konstruita en 1947 ĉirkaŭ la kampo, estis detruita. Rusiniak demandis, 'ĉu krom la trezorserĉantoj dum sep jaroj neniu okupiĝis pri tiu loko?'

Mi aldonas kion observis la grand-kamparano Józef Górski (...): 'Ne malproksime de Treblinka troviĝas la vilaĝo Wólka Okrąglik. La kamparanoj de tiu ĉi vilaĝo sendis siajn edzinojn kaj filinojn al la ukrainaj gardistoj de la koncentrejo kaj estis konsternitaj, kiam tiuj virinoj revenis nur kun malmultaj valoraĵoj, kiun ili ricevis kiel salajron por siaj servoj. La judoj ja devis postlasis multe pli. Sed nature tiu praktiko estis materie tre profitdona: La pajlaj tegmentoj malaperis kaj estis anstataŭigitaj per ladaj tegmenoj; la tuta vilaĝo faris la impreson, kvazaŭ eŭropeca bonfarto invadis tiun flankan angulon de Podlaĥio. Nature neniu pensis pri tio je kiuj kostoj de morala malgajno tiu bonfarto estis atingita.'<sup>79</sup>

13 monatojn post la ribelo Treblinka estis vizitita ankaŭ de grupo de sovetiaj ĵurnalistoj, inter kiuj troviĝis Vasilij Grossmann.<sup>80</sup> En la raporto titolita „La infero de Treblinka“ (Moskvo 1947), kiun la aŭtoro, sovetia judo kun ukraina deveno, postlasis, li konfirmis, ke la vizitantoj trovis en la tero de Treblinka putrantajn vestaĵojn de la mortigitoj, do ĉemizojn, pantalonojn, ŝuojn, krome cigaredajn skatoletojn, horloĝajn radetojn, tranĉilojn, razilojn, lampojn, infanajn ŝuetojn, mantukojn, puntajn tolaĵojn, tondilojn, fingroĉapeletojn, korsetojn, bandaĝojn kaj amason da frakasita ceramiko, krome teleorojn, tasojn, kuirpotojn, potojn kaj kaserolojn, pladojn kaj pelvojn, kruĉojn kaj tasojn. Trovitaj estis ankaŭ pasportoj, notlibroj, fotoj, leteroj, kartoj kaj kuponoj por nutraĵoj el Germanio, ĉie troviĝis flakonoj, parfumaj boteletoj. Subite aperis haroj de virinoj. Ĉie naŭzaj muŝoj atakis la rubaĵon, kaj lupenoj krevis, se oni surpaŝis ilin. Kiam en septembro 1945 pola esplorkomisiono vizitis la lokon, ĝi trovis en la cindro homajn restaĵojn kaj venis al la konkludo, ke tie okazis amasmurdo.

Poste, la komunisma registaro de Pollando konstruis memorialon sur la teritorio de la iama koncentrejo de Treblinka, kiu fariĝis publika muzeo.

## Bilancio

La mortfabriko de Treblinka funkciis (nur) dum dek ses monatoj inter julio 1942 kaj novembro 1943, kun interrompoj. Sole en la unuaj monatoj en Treblinka estis mortigitaj verŝajne minimume 300'000 personoj, precipe judoj, kiuj venis ĉefe el la Varsovia geto kaj el la Radoma distrikto. Post la kolapso de la funkciado de 'Treblinka II' en aŭgusto 1942, la kapacito de la koncentrejo devis esti adaptita al la gigantaj homamasoj, kiuj estis transportataj tien, kaj komence de septembro la grandstila amasmurdo estis daŭrigata per novaj transportoj el Varsovio. En januaro 1943 sekvis transportoj el Grodno kaj Bjalistoko, kaj en marto venis judoj el Balkanio, poste estis deportitaj homoj de la ribelo en la Varsovia geto (kiu estis likvidita en aprilo 1943), kaj fine Treblinkan atingis ankaŭ loĝantoj el diversaj koncentrejoj de la Tria Regno. Apartan grupon konsistigis la sintioj kaj romaoj (t.e. ciganoj), ĉ. 2000. Pro manko de dokumentoj kaj rektaj fontoj estas malfacile taksu la ekzaktan nombron de viktimoj de Treblinka. Glazar kredis, ke temas pri minimume okcent mil viktimoj, t.e. inter okcent kaj naŭcent mil homoj, ĉefe judoj. En la faka literaturo varias ciferoj de 700'000 ĝis unu miliono. Temas pri ciferoj, kiuj estis kalkulataj en ekspertizoj kadre de la Treblinka-procesoj de 1965. Ĉar la viktimoj ne estis registritaj kaj la spuroj forviŝitaj, neniu konas la ekzaktan sumon de la homoj pereintaj en Treblinka, nek ilian identecon (escepte de kelkdek personoj<sup>81</sup>). En la jaro 2000 oni trovis la kopion de radiomesaĝo, en kiu SS-Sturmbann-ŝefo Hermann Höfle komunikis la nombron de la mortigitaj judoj kadre de la *operaco Reinhard(t)* en la jaro 1942. Laŭ tiu ĉi fonto (la t.n. Höfle-telegramo) ĝis la fino de 1942 estis mortigitaj ekzakte 713'555 judoj – do, ŝajnas, ke la germanoj tamen iel kalkulis la mortigitajn viktimojn. Tio estas 56% de ĉiuj judoj, kiuj estis mortigitaj en la neniigejoj de la *operaco Reinhard(t)*. Do, la suma nombro de la viktimoj en Treblinka verŝajne estas ĉirkaŭ 850-900'000.<sup>82</sup> Laŭ la pritakso aŭ kalkulo de Franciszek Żabecki devis esti eĉ 1'200'000. Kiel ajn alta estas la vera nombro, Treblinka estas unika pro tio, ĉar ĝi estas tiu loko en la mondo, kie estis mortigita plej granda kvanto de homoj en relative mallonga tempo, en kiu tiu mortfabriko ekzistis.

Pri la jaro 1943 en la fakliteraturo estas menciitaj jenaj unuopaj ciferoj: 18'500 judoj el la distrikto Radom inter la 6a kaj 15a de januaro; 6929 judoj el la Varsovia geto ĝis la 24a de majo, inter tiuj estas 6500 de la 18a ĝis la 22a de januaro; 10'000 judoj el la distrikto Bjalistoko inter la 9a kaj 13a de januaro kaj 7600 je la 18/19aj de aŭgusto; 2120 judoj el Jesionowska je la 25a de januaro; 6000 judoj el Grodno inter la 14a kaj 22a de januaro; 4215 judoj el Tesaloniko (Grekio) inter la 26a kaj 28a de marto; tri transportoj kun 7144 makedonaj judoj je la 28a kaj 31a de marto kaj je la 5a de aprilo; 2800 judoj el Tesaloniko en majo kaj ĉ. 2000 sintioj kaj romaoj (ciganoj) en printempo 1943, sume do 67'308. Minimuma nombro de mortigitoj en Treblinka, kiu ĝis nun povis esti certigita en la faka literaturo, estas do 780'863. Tabelon kun detalaj ciferoj mi aldonas en la suba apendico. Kadre de la *operaco Reinhard(t)* pereis sume ĉirkaŭ 1,6 milionoj judoj ĉefe en la koncentrejoj de Bełżec, Sobibór kaj Treblinka. Sur pola teritorio pereis dum la dua mondmilito entute 2'316'541 milionoj judoj, la reala nombro estas verŝajne pli alta.<sup>83</sup>

Jankiel Wiernik karakterizis la tiaman „germanan sistemon“ jene: „La germana sistemo estas unu el la plej efikaj de la mondo. Aŭtoritatoj staras super instancoj, sekcioj, subsekcioj. Kaj kio estas plej grava: La ĝusta homo estas ĉiam en la ĝusta loko. Ĉiufoje, kiam oni bezonas senskrupulecon, deciditan agadon kaj la plenan detruadon de 'malicaj kaj konspiraj elementoj', tiam oni trovas bonajn patriotojn, kiuj plenumas ĉiun ordonon. Oni ĉiam povas trovi homojn, kiuj estas pretaj neniigi kaj mortigi aliajn homojn. Ĉe ili mi neniam vidis kompatemon aŭ bedaŭron. Ili neniam kompatis la senkulpajn viktimojn. Ili estis robotoj, kiuj plenumis siajn taskojn, kiam iu pli alta funkciulo premis la butonon. Tiaj hienaj homoj ĉiam trovas larĝan agadkampon en militaj tempoj kaj dum revolucioj. Por ili la malbono estas pli simpla kaj pli agrabla ol io ajn alia. Malicaj tipoj kaŝatendas en abomenaj lokoj, kie ili plenumas sian malmoralan laboron. Ĉiu moralo fariĝis malvalida. Ju pli malica kaj malvirta iu persono estas, des pli alta estos lia pozicio. Lia kariero dependas de la kvanto de detruo kaj kiom da homoj li mortigis. Estas homoj, el kies manoj fluas sango. La sango de senkulpaj homoj flatas ilin, kaj ili vidas nenian neceson lavi siajn manojn. Male, oni levas ilin alten, por ke la mondo povu fari honoron al ili. Ju pli malpura estas la memoro aŭ la manoj de iu persono, des pli multe oni ĝloras lin.“ La samaj principoj validis cetere ankaŭ por la stalinismo – ŝajnas do, ke la totalismaj sistemoj havas ilin komune.

**Konata nombro de deportitaj judoj el la Ĝenerala Gubernio kaj Bjalistoka distrikto al KC Treblinka en 1942/43**

<b>Distrikto kaj subdistrikto</b>	<b>Periodo</b>	<b>Nombro</b>
<b>Varsovio</b>	julio, septembro 1942 januaro, aprilo 1943	238'952
Garwolin	septembro, oktobro 1942	20'000
Mińsk Mazowiecki	aŭgusto, septembro 1942	15'520
Siedlce	aŭgusto, septembro, novembro 1942	21'000
Sokołów-Węgrów	septembro 1942	18'300
<b>Radom</b>	aŭgusto, septembro 1942 januaro 1943	70'500
Kielce	aŭgusto, septembro, oktobro 1942	31'500
Częstochowa	septembro, oktobro 1942	40'000
Radomsko	oktobro 1942, januaro 1943	20'400
Piotrków	oktobro 1942	27'500
Jędrzejów	septembro 1942	16'500
Busko	oktobro, novembro 1942	25'000
Konskie	oktobro, novembro 1942	18'000
Tomaszów Mazowiecki	oktobro, novembro 1942	42'800
Starachowice	oktobro 1942	27'100
Opatów	oktobro, novembro 1942, januaro 1943	45'100
<b>Lublin</b>		
Biała Podlaska	septembro, oktobro 1942	4'800
Radzyn	aŭgusto, oktobro, novembro 1942	28'500
<b>Białystok</b>		
Białystok Ghetto	februaro, aŭgusto 1943	17'600
Białystok Collection Camp (C.C.)	novembro, decembro 1942	9'320
Jasionowka	januaro 1943	2'120
Grodno	januaro, februaro 1943	6'000 (entute 10'000)
Bogusze C.C.	novembro, decembro 1942	9'100
Kelbasin C.C.	novembro, decembro 1942	38'900
Volkovysk C.C.	novembro, decembro 1942	16'300
Distrikto Bielsk-Podlaski	novembro 1942	18'630
<b>Entute</b>		<b>829'442</b>

Laŭ: Arad, Yitzhak: *Belzec, Sobibor, Treblinka. The Operation Reinhard Death Camps*. Bloomington and Indianapolis 1987. P. 392-7. (Tie la distriktoj kaj subdistriktoj estas detaligitaj ankaŭ laŭ urboj).

Alia kalkulo montras jenajn ciferojn:

Varsovia geto		309'975
Varsovia distrikto		91'750
Radoma distrikto		347'850
Lublina distrikto		37'500
Bjalistoka geto		20'000
Bjalistoka distrikto		50'000
Makedonio/Bulgario		7'144
<u>Greĥio</u>		2'800
Theresienstadt		18'004
<b>Entute</b>		<b>885'023</b>

Laŭ: Donat, Alexander (ed.): *The Death Camp Treblinka*. New York: Holocaust Library, 1979.

El: Chris Webb & Michal Chocholatý: *The Treblinka Death Camp. History, Biographies, Remembrance*. Stuttgart 2014. P. 193.

Ankaŭ la ekonomia bilanco de la „*Operaco Reinhard(t)*“ estis ‘ne malbona’. Laŭ la finkalkulo de la 5a de januaro 1944 la rikoltitaj valorajoj estis jenaj:

Kontanta mono	73.852.080,74 RM
Valoraj metaloj	8.973.651,60 RM
Devizoj laŭ bankbiletoj	4.521.224,13 RM
Devizoj laŭ oraj moneroj	1.736.554,12 RM
Juveloj kaj aliaj valoroj	43.662.450,-- RM
Ŝpinŝtofoj	46.000.000,-- RM
Entute	178.745.960,59 RM <sup>84</sup>

## Sorto de NS-funkciuloj kaj Treblinka-procesoj

Franz *Stangl* estis internigita de la usona armeo en 1945 sen koni lian rolon en Treblinka. En 1947 li estis transdonita al Aŭstrio, kie li sidis en la esplor-prizono pro la *operaco T4*.<sup>85</sup> En majo 1948 li fuĝis al Romo, kie la aŭstra katolika episkopo Hudal<sup>86</sup> havigis al li pasporton de la Ruĝa Kruco kaj vizon por veturi al Sirio. En 1951 li migris al Brazilo. En 1967 Stangl estis arestita kaj transdonita al la germana justico kaj en 1970 kondamnita de tribunalo en Düsseldorf pro la murdo de minimume 400'000 homoj. Stangl protestis kontraŭ la tribunala juĝo kaj forpasis korinfarkto, antaŭ ol la verdikto ekvalidiĝis. pro Gitta Sereny, brita biografino, historiistino kaj ĵurnalistino de german-hungara deveno, sukcesis intervjui lin en la malliberejo kaj publikigi unikan libron kun harhirtiga raporto (vd. bibliografion).

Christian *Wirth* estis mortigita de slovenaj partizanoj en 1944.

Odilo *Globocnik* fuĝis en majo 1945 al Aŭstrio kaj estis kaptita de britoj. De tie li estis transportita al la provinco Trentino, kie li mortigis sin per kalicianido.

Post la milito, Irmfried *Eberl* laboris kiel kuracisto en Ŝvabio. En 1947 usonanoj rimarkis lin. Laŭ sove-tia peto, Eberl estis arestita en januaro 1948, kaj nur en februaro li povis esti identigita. Post tio Eberl deci-dis pendigi sin la 16an de februaro 1948 en la esplor-prizono en Ulm. Lia identeco tamen daŭre ne estis oficiale konfirmita.

Kurt *Küttner*-Kiwe unue malaperis. Onidire, li fuĝis al GDR, kie li estis sekura kontraŭ la persekuto de la okcidentgermana justico. Tamen, li povis esti arestita sed forpasis en 1964 antaŭ la komenco de la Treblinka-proceso.

Laŭ nekonformitaj indikoj, Richard *Thomalla* estis ekzekutita en majo 1945 de NKVD en Ĉeĥoslovakio. En 1957 li estis deklarita de la germanoj kiel morta.

Juraj procesoj, kiuj estis lanĉitaj kontraŭ la SS-funkciuloj de la neniigejo ‚Treblinka II’, okazis trifoje en Frankfurt ĉe Majno en la jaroj 1950-51 kaj en Düsseldorf en la jaroj 1964-65 kaj 1969-70, kun 54 atest-antoj. Laŭ la koncernaj juĝoj, Franz Stangl (arestita en 1967, kondamnita en 1971, †1971), Kurt Franz (†1998), Heinrich Matthes (†?), August Miete (†?) kaj Willi Mentz (†1978) estis kondamnitaj al dumviva aresto en mal-liberejo. Gustav Müntzberger (†1977) ricevis 12, Franz Suchomel (†1979) 7, Otto Stadie (†1977) 6, Erwin Lambert (†1976) 4 kaj Albert Rum (†1970) 3 jarojn en malliberejo. Otto Horn estis absolvita.<sup>87</sup> En FRG, la mortpuno estis abolita en 1949, dum en GDR nur en 1987.

USSR kondamnis 37 gardistojn de Treblinka.

Unu el la ukrainaj gardistoj de Treblinka, Fjodor Fedorenko, estis pridemandita en 1978 en Florido, antaŭ ol li povis havigi al si la usonan ŝtatanecon kaj akuzita pro tio, ke li false informis la aŭtoritatojn pri sia pasinteco. Tion atestis Petrovich Malagon, alia ukraina gardisto en Treblinka, kiu samtempe deĵoris tie kune kun Fedorenko, kiu estis transdonita al la sovetiaj aŭtoritatoj en decembro 1984, de kiuj li estis, en junio 1986, post 10-taga publika tribunalo, kondamnita al morto kaj ekzekutita de pafkomando. Unu monaton poste la sovetianoj oficiale anoncis tiun ekzekuton.

### Apendico 2: Nomoj de la sovetiaj kaj ukrainaj gardistoj en Treblinka

(laŭalfabete kun la originala alfabeto de Webb/Chocholatý): Andreev, Mikolaj Bondarenko, Peter Bondave, Dmitry Borodin, Volodymir Cherniavsky, Piotr Dimitrenko, Fyodor Dushenko, Fedor Fedorenko, Pyotr Goncharov, Mikolay Gonzural, Pavel Grigorchuk, Wasil Jelenschuk, Dmitry Nikolayevich Korotkikh, Kostenko, Nikolay Kulak, Ivan Kurinnoy, Ananiy Grigoryevich Kuzminsky, Nikolay Lebedenko, Pavel (Vladimirovich) Leleko, Filip Levchishin, Nikolay Makoda, Nikolay (Petrovich) Malagon, Manchuk, Ivan (Ivanovich) Marchenko, Moisei Martoszenko, Teodozy Melnik, Mikolaj Nidosrelow, Daniel Onoprienko, Mikolaj Osyczanski, Alexander Para[Poro]schenko, Yevdokim Parfynyuk, Nikolay Payevschhik, Pilman, Leon Polakow, Samuel Prits, Alexander Rittich, Robertus, Grigory Rubez, Wasil Rudenko, Fyodor Ryabeka, Prokofiy (Nikolaevich) Rjabcev, Mikolaj Scheffler, Wasil Schischaew, Iwan Schmidkin, Alexander Schultz, Emanuel Genrikhov Schultz, Nikolay Senik, Mikolay Senykov, Nikolaj (Jegorovich) Schalayev,<sup>88</sup> Ivan Shevchenko, Ivan Shvidkoy, Nikolay Skakodub, Grigoriy Skydan, Oswald Strebel, Ivan Terekhov, Ivan Tkachuk, Wladimir Tscherniewskij, Sergey Vasiylenko, Alexander Voloshenko, Iwan Wasilenko, Wasil Woloszyn, Vasily Woronkow, Alexander Yeger, Vasily Yelenchuk, Trofim Zavidenko.<sup>89</sup>

---

### Ĉefa konsultita literaturo:

- **Wiernik, Jankiel:** *Rok w Treblince*. 1944. Warszawa 2003. Memuaro. (Anglalingve: *A Year in Treblinka*. Rete: <http://www.zchor.org/wiernik.htm>, germanlingve: *Ein Jahr in Treblinka*. Rete: <https://einjahrintreblinka.wordpress.com/tag/wiernik/>) (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Jankiel\\_Wiernik](https://de.wikipedia.org/wiki/Jankiel_Wiernik))
- **Glazar, Richard:** *Die Falle mit dem grünen Zaun. Überleben in Treblinka*. Memuaro. Eld. Fischer Taschenbuch, Frankfurt a.M. 1992; nova eldono ĉe Unrast, Münster 2008. (Pollingve: Stacja Treblinka. 2011.). Anglalingva titolo: Glazar, Richard: *Trap with a Green Fence - Survival in Treblinka*. Evanston, Illinois: Northwestern University Press, 1999. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Glazar](https://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Glazar))
- **Willenberg, Samuel:** *Treblinka. Lager, Revolte, Flucht, Warschauer Aufstand*. Memuaro. Hebrea originalo 1986. Trad. Steffen Hänschen. Eld. Unrast, Hamburg / Münster 2009. (Pollingve: *Bunt w Treblince*. 2004). Anglalingva titolo: Willenberg, Samuel. *Revolt in Treblinka*. Warsaw: Żydowski Instytut Historyczny, 1992. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Samuel\\_Willenberg](https://de.wikipedia.org/wiki/Samuel_Willenberg))
- **Rajchman, Chil:** *Ich bin der letzte Jude. Treblinka 1942/43. Aufzeichnungen für die Nachwelt*. Memuaro. El la franca trad. Ulrike Bokelmann, unue el la jida lingvo. Eld. Piper, München / Zürich 2009. (Pollingve: *Ocalalem z Treblinki*. 2011). Ĉapitron „En la dentista komando” vd. sub <http://jungle-world.com/artikel/2009/47/39829.html>. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Chil\\_Rajchman](https://de.wikipedia.org/wiki/Chil_Rajchman))
- **Weinstein, Eddie:** *17 dni w Treblince*. 2008. Memuaro. (Anglalingve: *17 Days in Treblinka*. Jerusalem 2008 (4a eld., vd. sub <http://www.zchor.org/losice/weinstein.htm>).
- **Rajgrodzki, Jerzy:** *Jedenaście miesięcy w obozie zagłady w Treblince*. TAL/ZIHW, Bulletin, Warsaw 1958, 25.
- **Grossman, Vasilij:** *Die Hölle von Treblinka*. Ĵurnalista raporto. Moskau 1947. (Rete: <http://de.scribd.com/doc/81463012/Wassilij-Grossmann-Die-Holle-von-Treblinka#scribd>) (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Wassili\\_Semjonowitsch\\_Grossman](https://de.wikipedia.org/wiki/Wassili_Semjonowitsch_Grossman))
- **Steiner, Jean-Francois:** *Treblinka: la révolte d'un camp d'extermination*. Paris 1968. Fikcia historia romano bazita sur faktoj kaj publikigita en 1966 post la Eichmann-proceso. Germanlingve: *Treblinka. Die Revolte eines Vernichtungslagers*. Berlin 1994. El la franca trad. Marianne Lipcowitz. Kun antaŭparolo de Simone de Beauvoir. (Vd. [https://fr.wikipedia.org/wiki/Jean-François\\_Steiner](https://fr.wikipedia.org/wiki/Jean-François_Steiner))
- **Benz, Wolfgang / Distel, Barbara:** *Der Ort des Terrors. Geschichte der nationalsozialistischen Konzentrationslager*. Band 8. Eld. C.H. Beck, München 2008.



- Młynarczk, Jacek Andrzej: *Treblinka – ein Todeslager der „Aktion Reinhard*. En: Musial, Bogdan (eld.): „*Aktion Reinhardt*“. *Der Völkermord an den Juden im Generalgouvernement 1941-1944*. Eld. fibre, Osnabrück 2004.
- Arad, Yitzhak: *Belzec, Sobibor, Treblinka. The Operation Reinhard Death Camps*. Bloomington and Indianapolis 1987. (Vd. ankaŭ [http://www.yadvashem.org/odot\\_pdf/Microsoft%20Word%20-%203576.pdf](http://www.yadvashem.org/odot_pdf/Microsoft%20Word%20-%203576.pdf))
- Chrostowski, Witold: *Extermination camp Treblinka*. London 2004. (Enhavo: <http://www.ub.unibas.ch/tox/HBZ/HT014779651/PDF>)
- Chris Webb & Michal Chocholatý: *The Treblinka Death Camp. History, Biographies, Remembrance*. Stuttgart 2014. (Online vd. Google Books).
- Sereny, Gitta: *Am Abgrund. Eine Gewissensforschung. Gespräche mit Franz Stangl, Kommandant von Treblinka, u.a.* Ullstein, Frankfurt am Main / Berlin / Wien 1980. Anglalingva titolo: *Into that Darkness - From Mercy Killing to Mass Murder*. London: McGraw-Hill Book Company, 1974. (Vd. [https://fr.wikipedia.org/wiki/Gitta\\_Sereny](https://fr.wikipedia.org/wiki/Gitta_Sereny)).
- Golczewski, Frank: *Polen*. En: Wolfgang Benz: *Dimension des Völkermordes*. Dtv München 1996, p. 412-97.
- Laufenberg, Walter: *Der Hund von Treblinka*. Romano. München 2008. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Walter\\_Laufenberg](https://de.wikipedia.org/wiki/Walter_Laufenberg))
- Gutman, Israel: *Enzyklopädie des Holocaust. Die Verfolgung und Ermordung der europäischen Juden*. Piper München Zürich 1989. (4 vol.).
- Hilberg, Raul: *Die Vernichtung der europäischen Juden*. Fischer Frankfurt/M. 9/1999. (3 vol.)
- Kamiński, Andrzej J.: *Konzentrationslager 1896 bis heute. Geschichte. Funktion. Typologie*. Kohlhammer Stuttgart 1982, Piper München / Zürich 1990. Piper München Zürich 1989.

Aliaj rilataj titoloj:

- Donat, Alexander (ed.): *The Death Camp Treblinka*. New York: Holocaust Library, 1979.
- Teicholz, Tom: *The Trial of Ivan the Terrible: State of Israel vs. John Demjanjuk*. New York : St. Martin's Press, 1990
- Burba, Dr. Manfred: *Treblinka: Ein NS-Vernichtungslager im Rahmen der 'Aktion Reinhard'*. Göttingen, 2000.

## Interretaj resursoj:

Fotoj kaj materialoj pri Treblinka:

Fotoj [http://www.deathcamps.org/treblinka/photos\\_de.html](http://www.deathcamps.org/treblinka/photos_de.html)

Filmoj pri Treblinka:

<https://www.youtube.com/watch?v=FGDLLE53-ME>

<https://www.youtube.com/watch?v=ukqGZYQUiMo>

<https://www.youtube.com/watch?v=pRw2nNgL2Yo>

<https://www.youtube.com/watch?v=LeMbr5If8i8>

<https://www.youtube.com/watch?v=PwXEmg4IXOw>

Fotoj pri Treblinka:

<https://www.youtube.com/watch?v=R8W6MCHo-6k>

Eljahu Rosenberg

<https://www.youtube.com/watch?v=ogmBWA9Y7Bk>

<https://www.youtube.com/watch?v=WxVdqilb0yA>

Ghetto Fighters House (GFH) website:

<http://www.gfh.org.il>

JewishGen, Inc. Website:

<http://www.jewishgen.org>

Jad Vashem Central Database of Shah Victims Names:  
<http://db.yadvashem.org/names/search.html?language=de>

Treblinka-procesoj:

<https://de.wikipedia.org/wiki/Treblinka-Prozesse>  
[https://en.wikipedia.org/wiki/Treblinka\\_trials](https://en.wikipedia.org/wiki/Treblinka_trials)

---

Piednotoj:

<sup>1</sup> Vd. [http://eo.wikipedia.org/wiki/Zofia\\_Banet-Fornalowa](http://eo.wikipedia.org/wiki/Zofia_Banet-Fornalowa) kaj [http://eo.wikipedia.org/wiki/Jerzy\\_Fornal](http://eo.wikipedia.org/wiki/Jerzy_Fornal), [https://eo.wikipedia.org/wiki/Josef\\_Semer](https://eo.wikipedia.org/wiki/Josef_Semer), [https://de.wikipedia.org/wiki/Robert\\_Kuwalek](https://de.wikipedia.org/wiki/Robert_Kuwalek).

<sup>2</sup> Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Wannsee-konferenco>.

<sup>3</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Odilo\\_Globocnik](http://de.wikipedia.org/wiki/Odilo_Globocnik).

<sup>4</sup> Pli detale pri tiu operaco vd. sub [http://en.wikipedia.org/wiki/Operation\\_Reinhard](http://en.wikipedia.org/wiki/Operation_Reinhard). La ĉefoficejo de la „Operaco Rienhard(t)“ situis ĉe Tiergartenstrasse en Berlino.

<sup>5</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Reinhard\\_Heydrich](http://de.wikipedia.org/wiki/Reinhard_Heydrich).

<sup>6</sup> Vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/Euthanasie>.

<sup>7</sup> Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion\\_T4](https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_T4).

<sup>8</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Zwangsarbeitslager\\_Trawniki](http://de.wikipedia.org/wiki/Zwangsarbeitslager_Trawniki).

<sup>9</sup> Kiel stacidomestro deĵoris Franciszek Ząbecki, membro de la pola subtera movado, kiu regule reportis al Armia Krajowa, kio okazis en kaj ĉirkaŭ la stacidomo Treblinka. (Vd. F. Ząbecki: *Wspomnienia dawne i nowe*. Warszawa 1977).

<sup>10</sup> Fotoj de la stacidomo en Treblinka kaj la reloj estas videblaj sub [http://www.deathcamps.org/treblinka/photos\\_de.html](http://www.deathcamps.org/treblinka/photos_de.html).

Nuntempe, la stacidomo de Treblinka ne plu funkcias. Kvankam ne plu originalaj, la reloj tamen daŭre ekzistas, sur kiuj de tempo al tempo veturas varvagonaro.

<sup>11</sup> Arad, p. 63f. Traduko de A.K.

<sup>12</sup> Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_Höfle\\_\(SS-Sturmbannführer\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_Höfle_(SS-Sturmbannführer)) kaj [https://de.wikipedia.org/wiki/Heinz\\_Auerswald\\_\(Jurist\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Heinz_Auerswald_(Jurist)).

<sup>13</sup> Karakterizon pri la koncentrejo Treblinka I<sup>o</sup> donis Vasilij Grossmann en sia raporto *La infero de Treblinka* (Moskvo 1947). Ankaŭ kelkaj viktimoj, kiuj postvivis tiun ĉi koncentrejon, rakontis pri la teruraj kondiĉoj tie kaj pri la sadismaj SS-nazioj, kiuj gvidis la lagron kaj turmentegis la prizonanojn. La 23an de julio 1944 Treblinka I<sup>o</sup> estis likvidita de la germanoj. Wiernik priskri-bis la 500 judojn, kiuj venis de Treblinka I<sup>o</sup> kiel „apenaŭ vivantaj, brutale turmentatajn. Ili aspektis kvazaŭ ili petegus, ke ili povu morti, kaj fakte, ili ĉiuj estis mortigitaj.“

<sup>14</sup> Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Theodor\\_van\\_Eupen](https://en.wikipedia.org/wiki/Theodor_van_Eupen).

<sup>15</sup> Vd. Webb/Chocholatý: *The Treblinka Death Camp*, 2014, p. 11-18.

<sup>16</sup> M aplikas ĉi tie la provon esperantigi SS-rangojn en nekompleta kaj nesistema maniero. La rangojn de la SS-oficiroj vd. sub [http://de.wikipedia.org/wiki/Bildtafel\\_der\\_Dienstgrade\\_und\\_Rangabzeichen\\_der\\_Waffen-SS](http://de.wikipedia.org/wiki/Bildtafel_der_Dienstgrade_und_Rangabzeichen_der_Waffen-SS).

<sup>17</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Thomalla](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Thomalla).

<sup>18</sup> Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉefgubernio>. Mi preferas la nomon „Ĝenerala Gubernio“.

<sup>19</sup> Jan Sułkowski, kiu estis prizonulo de Treblinka I<sup>o</sup> kaj kunkonstruinto de Treblinka II<sup>o</sup>, plu vivis kaj rakontis kiel atestanto dum la proceso kontraŭ Ludwig Fischer en januaro 1945.

(Vd. [http://inconvenienthistory.com/archive/2011/volume\\_3/number\\_3/a\\_premature\\_news\\_report.php](http://inconvenienthistory.com/archive/2011/volume_3/number_3/a_premature_news_report.php)).

<sup>20</sup> Mapojn de la koncentrejo Treblinka II<sup>o</sup> vd. sub <http://www.deathcamps.org/treblinka/pic/bmap22.jpg> kaj

<https://holocausthistorychannel.wordpress.com/2013/05/26/dimensions-and-structure-of-the-treblinka-cremation-facilities>. Tre bona modelo de la tuta koncentrejo estas videbla sub [https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/9/97/PikiWiki\\_Israel\\_31806\\_Model\\_of\\_Treblinka\\_Death\\_Camp.JPG](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/9/97/PikiWiki_Israel_31806_Model_of_Treblinka_Death_Camp.JPG).

<sup>21</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Irmfried\\_Eberl](http://de.wikipedia.org/wiki/Irmfried_Eberl).

<sup>22</sup> Ĉi tiu dato kongruis kun la juda (fosta kaj funebra) tago Tiša B(e)´av, en kiu la judoj memoras pri la detruado de la du Jerusalemaj Temploj kaj pri aliaj judaj tragedioj. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Tischa\\_beAv](https://de.wikipedia.org/wiki/Tischa_beAv))

<sup>23</sup> Ilia nomoj estas konataj: Rudolf Emmerich kaj Willi Klinzmann (aŭ eble Klinsmann), almenaŭ en julio kaj aŭgusto 1942.

<sup>24</sup> En la unua fazo de la koncentrejo Treblinka II<sup>o</sup> (kiu daŭris ĝis la fino de aŭgusto 1942), la ramplo kaj la stacidomo ankoraŭ ne ekzistis.

<sup>25</sup> Vd. <https://yearintreblinka.wordpress.com> (anglalingve). Pri Jankiel Wiernik vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Jankiel\\_Wiernik](https://de.wikipedia.org/wiki/Jankiel_Wiernik).

<sup>26</sup> Arad skribis sur p. 41, ke flanke de la reloj ne ekzistis signoj, kiuj identigis la lokon kiel stacidomon. Tiu situacio eble estis en la komenco, kaj nur post la reorganizado de la koncentrejo aperis la signoj menciitaj en la ĉefa teksto.

<sup>27</sup> Ŝajniga, falsa, trompa imitaĵo, nura dekoracio.

<sup>28</sup> Pri ĉi tiu temo vd. sub <http://www.sobiborinterviews.nl/en/extermination-camp/arbeitsjuden>.

- <sup>29</sup> Vd. Richard Glazar, aŭtoro de la memuarlibro *Die Falle mit dem grünen Zaun* (1992).
- <sup>30</sup> Ze'ev (Zev) Kurland ne estis nazio, sed judo, varsovia komercisto, kiu fariĝis rekta atestanto de la amasmurdo en la lazareto de ‚Treblinka II‘ kaj estis unu el la plej fruaj membroj de la subtera movado (nomata ‚Organiza komitato‘) de ‚Treblinka II‘. Li havis la malgajan taskon akompani multajn judojn ĝis ilia perforta morto apud la foso de la lazareto, kiu estis trompe kaŝita kiel hospi-talo de la Ruĝa Kruco.
- <sup>31</sup> Mi preferas en ĉi tiu kazo la vorton personalo anstataŭ personaro.
- <sup>32</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Max\\_Biala](http://de.wikipedia.org/wiki/Max_Biala). La 11an de septembro 1942 ĉi tiu SS-Untersturmŝvidanto estis mortigita dum selektado sur la apelpalaco de la argentina judo Meir Berliner, kiu vizitis Varsovion kun sia familio, kiam la milito eksplodis, kaj estis deportita al ‚Treblinka II‘. Dum liaj edzino kaj filino estis senditaj al la tieaj gasĉambroj, Berliner estis selektita por laboro. Sed post la incidento kun Biala li estis senprokraste mortbatita kune kun du aliaj prizonuloj, dum laŭ alia fonto cent judoj estis mortpafitaj kiel venĝo por la mortigo de Biala.
- <sup>33</sup> Ŝajnas, ke la dragmaŝino(j) estis prenita(j) de ‚Treblinka I‘.
- <sup>34</sup> Kiel post la reorganizado de ‚Treblinka II‘ tiu nova konstruaĵo aspektis vd. modelon sub [https://pl.wikipedia.org/wiki/Treblinka\\_\(KL\)#/media/File:PikiWiki\\_Israel\\_31806\\_Model\\_of\\_Treblinka\\_Death\\_Camp.JPG](https://pl.wikipedia.org/wiki/Treblinka_(KL)#/media/File:PikiWiki_Israel_31806_Model_of_Treblinka_Death_Camp.JPG).
- <sup>35</sup> Aŭtoro de la memuarlibro *Treblinka* (2009).
- <sup>36</sup> Eventuale temas pri Ivan Marĉenko (vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Iwan\\_Martschenko](http://de.wikipedia.org/wiki/Iwan_Martschenko)) kaj [http://en.wikipedia.org/wiki/Ivan\\_the\\_Terrible\\_\(Treblinka\\_guard\)](http://en.wikipedia.org/wiki/Ivan_the_Terrible_(Treblinka_guard)), sed la vera identeco de tiu Ivan neniam povis esti definitive konfirmita. Iuj atestantoj de Treblinka kredis, ke ili vidis tie furori la ukrainon Ivan Demjanjuk, kiu ĝis la fino de sia vivo kontestis sian identecon (vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/John\\_Demjanjuk](http://de.wikipedia.org/wiki/John_Demjanjuk) kaj <http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-13681024>). La historio de Marĉenko estas detale traktita de Chris Webb & Michal Chocholatý: *The Treblinka Death Camp. History, Biographies, Remembrance*. Stuttgart 2014, p. 219-230.
- <sup>37</sup> Laŭ iu atestanto dum la Eichmann-proceso, vd. sub <https://www.youtube.com/watch?v=FGDLLE53-ME>, min. 36:40.
- <sup>38</sup> Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion\\_T4](https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_T4).
- <sup>39</sup> La cifero varias laŭ indiko de atestantoj.
- <sup>40</sup> La brikoj estis prenita de kameno de forlasita vitrofabriko en Malkinia.
- <sup>41</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Christian\\_Wirth](http://de.wikipedia.org/wiki/Christian_Wirth).
- <sup>42</sup> Arad, p. 183.
- <sup>43</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Franz\\_Stangl](http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Stangl). Aparte legindaj estas la intervjuoj, kiujn Gitta Sereny faris kun Stangl, kiam li restadis en la malliberejo. Ili estis publikigitaj en la libro *Am Abgrund. Eine Gewissensforschung*. (Ullstein Frankfurt/M. 1980).
- <sup>44</sup> La ordonon forbruligi ĉiujn kadavrojn por forviŝi la spurojn de la amasmurdo donis Heinrich Himmler post kiam li vizitis surloke la situacion en la koncernaĵi neniigejoj. Vd. pli sube.
- <sup>45</sup> Vd. Zofia Banet-Fornalowa: *La familio Zamenhof*. 1a eld. LF-koop. 2000, p. 91-92, laŭ: Josef Semer: ‚La lastaj tagoj de Lidja Zamenhof‘ en *Israella esperantisto* 113/1993, p. 1-3; Wendy Heller: *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof*. Antwerpen 2007. En la libro de Vd. Webb/Chocholatý: *The Treblinka Death Camp*, 2014, Lidia Zamenhof estas menciita sur p. 303.
- <sup>46</sup> Alia fama juda esperantisto de Pollando, kiu estis murdita en Treblinka, estis *Izrael Lejzerowicz* (1901-1942, vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Izrael\\_Lejzerowicz](https://eo.wikipedia.org/wiki/Izrael_Lejzerowicz)). Li naskiĝis en Lodzo kaj laboris kiel ĵurnalisto kaj komercisto. Li lernis Esperanton en 1912/13 kaj gvidis la Esperanto-movadon en Lodzo. Li estis prezidanto de Hebrea Esperanto-Asocio, ano de la Lingva Komitato kaj ĝenerala sekretario de la Organiza Komitato de la 4-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto (1930). Li multe prelegis, instruis, publikigis artikolojn en Esperanto revuoj kiel *Pola Esperantisto*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*. Li verkis jidan lernolibron kaj ŝlosilon kaj tradukis la verkon ‚Dibuk‘ de An-Ski el la hebrea kaj ‚La Sorĉistino el Kastilio‘ de Aŝ el la jida. Lejzerowicz elstaris precipe kiel satira verkisto kaj fariĝis konata kiel aŭtoro de ‚El la ‚Verda Biblio!‘, kiu estiĝis en 1935. Per siaj kontribuadoj li celis defendi la idean flankon de Esperanto kaj ne hezitis protesti kontraŭ la movada defetismo rilate al faŝismo. Li vivis en la Varsovia geto de 1940 ĝis 1942, kiam li kun sia familio estis deportita al Treblinka. Laŭ informo de *Pola Esperantisto*, 1946, al Treblinka estis senditaj por gas-mortigo ankaŭ *Adolf Oberrotman*, multjara UEA-delegito en Varsovio, *Paulina Muszkatblat*, doktorino en Varsovio kaj estrarano de la varsovia Esperanto-societo ‚Konkordo‘, *Eugenia Pasztejn, d-roj Ignacy Krenicki* kaj *Izaak Krenicki*, estraranoj de la Esperanto-societo ‚Laboro‘, kaj *Natan Ŝapiro*, eldonisto.
- <sup>47</sup> Vd. <https://prezi.com/bcifu13-25be/sonia-lewkowicz-holocaust-survivor>.
- <sup>48</sup> Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Janusz\\_Korczak](https://en.wikipedia.org/wiki/Janusz_Korczak).
- <sup>49</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Kurt\\_Franz\\_\(SS-Mitglied\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Franz_(SS-Mitglied)).
- <sup>50</sup> Temas pri [https://de.wikipedia.org/wiki/Josef\\_Oberhauser\\_\(SS-Mitglied\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Josef_Oberhauser_(SS-Mitglied)).
- <sup>51</sup> Kompreneble, ‚homo‘ signifas la hundon Barry, kaj ‚hundo‘ signifas la homon (judon), kiu estis atakita de tiu hundo.
- <sup>52</sup> La juĝon de la tribunalo Düsseldorf vd. sub <http://www.holocaust-history.org/german-trials/treblinka-urteil.shtml>.
- <sup>53</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Barry\\_\(Mischlingshund\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Barry_(Mischlingshund)). Fotojn de Barry vd. sub [http://www.deathcamps.org/treblinka/barry\\_de.html](http://www.deathcamps.org/treblinka/barry_de.html).
- <sup>54</sup> Vd. [http://en.wikipedia.org/wiki/Kurt\\_Küttner](http://en.wikipedia.org/wiki/Kurt_Küttner).
- <sup>55</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Otto\\_Stadie](http://de.wikipedia.org/wiki/Otto_Stadie).
- <sup>56</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Willi\\_Mentz](http://de.wikipedia.org/wiki/Willi_Mentz).
- <sup>57</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/August\\_Miete](http://de.wikipedia.org/wiki/August_Miete).
- <sup>58</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Franz\\_Suchomel](http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Suchomel). Franz Suchomel rakontas al Claude Lanzmann pri Treblinka (27.4.1976 im Hotel Post in Braunau am Inn: [https://www.youtube.com/watch?v=yfxnB\\_5AiU](https://www.youtube.com/watch?v=yfxnB_5AiU)).
- <sup>59</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Gustav\\_Münzberger](http://de.wikipedia.org/wiki/Gustav_Münzberger).
- <sup>60</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich\\_Matthes](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Matthes).
- <sup>61</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Josef\\_Hirtreiter](http://de.wikipedia.org/wiki/Josef_Hirtreiter).
- <sup>62</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Albert\\_Rum](http://de.wikipedia.org/wiki/Albert_Rum).
- <sup>63</sup> Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Otto\\_Horn\\_\(SS-Mitglied\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Otto_Horn_(SS-Mitglied)).

- 64 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Lorenz\\_Hackenholt](http://de.wikipedia.org/wiki/Lorenz_Hackenholt).
- 65 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Erwin\\_Lambert](http://de.wikipedia.org/wiki/Erwin_Lambert).
- 66 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Erich\\_Fuchs\\_\(SS-Mitglied\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Fuchs_(SS-Mitglied)).
- 67 Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Fritz\\_Schmidt\\_\(SS\\_officer\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Fritz_Schmidt_(SS_officer)) (kun foto en Treblinka).
- 68 Vd. <http://jungle-world.com/artikel/2009/47/39829.html>.
- 69 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst\\_Stengelin](http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Stengelin).
- 70 Vd. <http://www.deathcamps.org/treblinka/perpetrators.html>.
- 71 Vd. [http://en.wikipedia.org/wiki/Herbert\\_Floss](http://en.wikipedia.org/wiki/Herbert_Floss).
- 72 Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Sonderaktion\\_1005](https://de.wikipedia.org/wiki/Sonderaktion_1005).
- 73 La ribelo en la Varsovia geto de aprilo/majo 1943 esperigis la prizonulojn de Treblinka, sed samtempe senluziigis ilin post kiam ĝi estis sufokita de la germanoj kun dekmiloj da viktimoj.
- 74 Vd. [http://en.wikipedia.org/wiki/Jankiel\\_Wiernik](http://en.wikipedia.org/wiki/Jankiel_Wiernik). En ĉi tiu raporto estas menciita la Zamenhof-strato de la Varsovia geto.
- 75 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Glazar](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Glazar). Intervjuo: [https://www.youtube.com/watch?v=Fj\\_GfRqRc4](https://www.youtube.com/watch?v=Fj_GfRqRc4).
- 76 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Samuel\\_Willenberg](http://de.wikipedia.org/wiki/Samuel_Willenberg). Filmo: [https://www.youtube.com/watch?v=LL6nVq\\_z3O4](https://www.youtube.com/watch?v=LL6nVq_z3O4).
- 77 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Chil\\_Rajchman](http://de.wikipedia.org/wiki/Chil_Rajchman).
- 78 Dum ĉiuj ĉefaj gvidantoj de la subtera movado kaj la organizintoj kaj komandistoj de la ribelo pereis antaŭ aŭ dum la fuĝado, entute 350-400 homoj mortis en la koncentrejo dum la ribelo; 100 el 1850 prizonuloj ne sukcesis fuĝi kaj postrestis en la koncentrejo. Dum ĉirkaŭ 200 sukcesis eskapi vivaj, fine nur 60-100 prizonuloj postvivis la ĉasadon fare de la persekutantoj.
- 79 Jan T. Gross: *Angst. Antisemitismus nach Auschwitz in Polen*. Berlin 2012. P. 118-121.
- 80 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Wassili\\_Semjonowitsch\\_Grossman](http://de.wikipedia.org/wiki/Wassili_Semjonowitsch_Grossman).
- 81 Liston de viktimoj kaj postvivantoj de Treblinka kun koncizaj biografioj vd. sub <http://www.deathcamps.org/treblinka/roll%20of%20remembrance.html> kaj ĉe Chris Webb & Michal Chocholatý: *The Treblinka Death Camp. History, Biographies, Remembrance*. Stuttgart 2014, p. 231-304.
- 82 La ciferojn pri viktimoj en naziaj koncentrejoj de la Ĝenerala Gubernio vd. sub *Dimension des Völkermordes*. Dtv München 1996, p. 17. Alia pritakso baziĝas sur 974'000, vd. en la sama libro sur p. 495.
- 83 Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust#Gesamtzahlen\\_j.C3.BCdischer\\_Opfer](https://de.wikipedia.org/wiki/Holocaust#Gesamtzahlen_j.C3.BCdischer_Opfer).
- 84 Pri la rezulto de la ekonomia rikolto de la „Operaco Reinhardt(t)“, vd. sub [https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion\\_Reinhardt#Bilanz](https://de.wikipedia.org/wiki/Aktion_Reinhardt#Bilanz).
- 85 Pri kio temas vd. sub [https://eo.wikipedia.org/wiki/Aranĝo\\_T4](https://eo.wikipedia.org/wiki/Aranĝo_T4). Por la germana vorto „Operation“ aŭ „Aktion“ mi preferas la vorton „operaco“.
- 86 Vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Alois\\_Hudal](http://de.wikipedia.org/wiki/Alois_Hudal).
- 87 Vd. <http://de.wikipedia.org/wiki/Treblinka-Prozesse>.
- 88 En aprilo 1945 Ŝalajev forveturis kun la germanoj kaj iris al Karintio (Aŭstrio), kie en majo li estis arestita de sovetianoj kiel malliberulo de la milito kaj reintegrata en la sovetian armeon. Post la milito li revenis al USSR.
- 89 Inter la sovetiaj/ukrainaj virinoj, kiuj laboris por la germanoj en Treblinka, povis esti identigitaj post la milito de la sovetiaj instancoj Aleksandra Terent'evna Kirpa, Marija Ivanovna Korobka, Malanja Efimovna Nezdliyminoĥa, Nina Dmitrevna Ŝijenko, Aleksandra Nikiforovna Sumskaĵa, Anna Ivanovna Sumskaĵa, Nadeĵda Javtuckevna Timofenko, Evdokija Nikitovna Tretjak.



© Prilaborita de A. Künzli, Svislando. Originale verkita en Esperanto kaj publikigita sur [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch) en decembro 2015. La aŭtoro (nask. 1962 en Svislando) studis slavan filologion, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato kaj finis siajn studojn en 1992 per la akademia grado lic. phil. (M.A.). La aŭtoro okupiĝas pri juda historio de multaj jaroj. Dum siaj vojaĝoj al orienta Eŭropo li vizitis la „muzeon“ Treblinka en 1987. Poste li vizitis ankaŭ la lokojn de la iamaj koncentrejoj de Auschwitz, Majdanek (Lublin), Bełżec kaj Sobibór en Pollando, Dachau, Sachsenhausen kaj Buchenwald en Germanio, Theresienstadt en Ĉeĥio, Salaspils en Latvio, Klooga en Estonio, Risiera di San Sabba/Treste en Italio, kaj Mauthausen en Aŭstrio.

Aliajn tekstojn pri judaj temoj kaj holokaŭsto vd. sub:  
[http://www.planlingvoj.ch/Litovio\\_holokausto1941-44.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Litovio_holokausto1941-44.pdf)  
[http://www.planlingvoj.ch/Recenzo\\_Raszkin\\_Miastelo.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Recenzo_Raszkin_Miastelo.pdf)  
[http://www.planlingvoj.ch/Zamenhof\\_judademando.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Zamenhof_judademando.pdf)  
[http://www.planlingvoj.ch/Ausvico2015\\_Putin\\_antisemitismo.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Ausvico2015_Putin_antisemitismo.pdf)  
 Zamenhof-Biographie von A. Künzli (Harrassowitz 2010)